

ESPERANTO



Post prelego esperanflingva de nia franca samideano René Liech-Walter, estrano de UEA, en Tarrasa (Hispanujo), amika festeno kunvenigis la geesperantis-tojn de la urbo. Ĉe la fino de la festeno okazis disdono de diplomoj al la laŭreatoj de la esperantistaj konkursoj. Nia fotografiaĵo prezentas s-ron Liech-Walter, kiu kore gratulas laŭreaton. Flanke de la prelegisto sidas s-ro Chaler-Arnaŭ, Delegito de UEA en Tarrasa.

N-ro 603 (2)

Februaro 1956



REVUO INTERNACIA

Revuo Internacia

N-ro 603 (2)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto: H. HODLER

* * *

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

* * *

Ĉion por la redakcio oni sendu al la
Redaktoro: W. AULD

Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrew-
shire, Skotlando.

* * *

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo
ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj)
sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-
CIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.
Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

* * *

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian
represajon al nia redakcio.

Jara abono (1956): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj
jarlibro 10 n.gld.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

* * *

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
		1/16 paĝo	8.— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por
ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

Eldonnombro 6500.

Estraro de U.E.A.:

E. Malmgren, prezidanto, Heleneborgsgatan 6,
Stockholm, Svedujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77
Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Bri-
tujo.

D. Kennedy, vic-prezidanto, 21 Westfield Road,
Bishop Auckland Co, Durham, Britujo.

P. M. Mabesoone, estrarano pri financoj, Pytha-
gorasstraat 122, Amsterdam-O, Nederlando.

R. Lech-Walter, estrarano pri kongresoj, 5 Quai
Vauban, Perpignan (Pyrénées-Orientales),
Francujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex,
Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

ENHAVO

La Prezidanto de UEA:	17
Firme autaŭen	17
Flugfolio por neesperantistaj Kongresoj	17
Kampanjo por apogantoj	17
Fondaĵo Universala Ekspozicio	18
Solenaĵoj okaze de la oficiala inaŭguro	19
Sen homa mezuro (Korinek)	24
La soldato kiu marŝas (Piron)	27
Leteroj (Tefi)	27
Ĉiu helpu al informado pri Esperanto	28
La dana modo	29
Vagado sub palmoj (7)	30

Rubrikoj

Tra la mondo esperantista	21
CED	22
Internacia Konkurso	23
APO	24
41a UK de Esperanto	25
Radio	25
Radio-Babiloj	26
Nia Forumo	26
Oficiala Informilo	32

LA PREZIDANTO DE UEA:

Se komerca firmao stagnas en sia evoluo, se ĝiaj produktoj ne gajnas pli kaj pli vastan merkaton, bona estraro esploras la kaŭzojn. Entreprenema estraro ne hezitas fari radikalajn ŝanĝojn en la gvidado kaj pri la metodoj. Povas esti ke la novaj direktoroj kaj la novaj metodoj ne havos pli sukcesajn rezultojn ol antaŭe. Sed povas ankaŭ okazi, kaj tion oni esperas kaj atendas, ke la firmao grandstile evoluigas.

Simile agis la komitato kaj la voĉdona aparato de UEA proponante novan statuton aprobitan en ĝen. voĉdono havigante novan oficejon, elektante novajn ĝeneralan sekretarion kaj administranton. Pri la rezultoj de tiuj novaranĝoj juĝos la estonto. Laŭ la sciigoj, kiujn mi havas el tre multaj landoj, la tutmonda esperantistaro ĝenerale kun granda optimismo fidis je tiu nova aktiveco.

Estas bedaŭrinde unu escepto: la sekretario de EANA prenis kiel sian taskon en sia landa organo verŝi venenon al UEA kaj al diversaj personoj. Siajn personajn malamikojn, evidente tre multajn aparte en Usono mem li jam dum pluraj jaroj nomis „politikaj malfideluloj“. Kaj nun li direktas sin aparte al nia ĝenerala sekretario, Evidente supozante ke tiu estas same sendependa en sia agado kiel la sekretario de EANA, li inside nomas nian ĝeneralan sekretarion „la nova diktatoro de UEA“. La fakto estas ke nia ĝenerala sekretario laboras laŭ tre konkretaj instrukcioj de la komitato kaj de la estraro. Krome la estraranoj konstante per preskaŭ ĉiusemajnaj cirkuleroj kaj leteroj inter si diskutas kaj decidas pri ĉiuj aferoj faritaj kaj farotaj.

UEA ne estas la sama kiel la ĝenerala sekretario aŭ la sama kiel iu ajn izolita persono. La membroj formas la asocion, kaj la prezidanto, la ĝenerala sekretario, la ceteraj estraranoj, la komitatoj, la administranto, la redaktoro, la konstanta kongresa sekretario, ĉiu havas siajn difinitajn taskojn.

Ĉiu membro de UEA estas libera kritiki la asocion kaj ĝiajn funkciojn rilate al la agado, la metodoj, la eventualaj mispaŝoj kaj eraroj, kun la celo atingi pli taŭgan kaj celkonscian aktivecon por la disvastigo de nia lingvo. Sed kondamninda estas kritiko, kiu endanĝerigas la neŭtralecon de la asocio laŭ par. 4, kiun neŭtralecon la asocio rigore gardis ekde sia fondiĝo. Ankaŭ klaĉado pro persona antagonismo al la funkcioj, kiam tiuj en sia agado por la movado kaj la asocio evitas ĉian deflankiĝon de la nomita neŭtraleco, estas kondamninda, ĉar tio malaltigas la prestiĝon de la asocio.

Ernfrid Malmgren.

FIRME ANTAŬEN

Gravaj eventoj postulas rapidajn, celtrafajn decidojn. Por Universala Esperanto-Asocio la lastaj monatoj estis plenaj de signifaj kaj kuraĝigaj okazaĵoj. La rapida kaj pli ol kontentiga solvo de la oficeja problemo, la aktiva partopreno de la asociaj reprezentantoj en pluraj gravaj internaciaj konferencoj, la plifirmigo de la kunlaborado kun UNESKO, la nuna stadio en la rilatoj de la Asocio kun la Eŭropa Konsilantaro, la maturiĝo de la preparaj laboroj por la enkonduko de la lingvo en la lernejojn, la intensigo de la informado kaj la larĝigo de la laboroj de CED — ĉio ĉi, en kunligo kun la konstanta progresado kaj iom-post-ioma akirado de novaj pozicioj por Esperanto en la pasintaj jaroj, rezultigis ankaŭ novan konsiderindan kreskon de la membraro. La 15-an de decembro, precize je la datreveno de la nas-

FLUGFOLIO POR NEESPERANTISTAJ KONGRESOJ

La Informa Fakto de UEA ĵus eldonis flugfoliojn, ĉefe direktitan al la partoprenantoj de internaciaj neesperantistaj kongresoj kaj konferencoj. Tamen, ĝi estas bone uzehla ankaŭ por aliaj okazoj. La tekston de la flugfolio prizorgis la Informa Fakto de UEA kaj ĝi estis aprobita de la landaj informaj faktoj. La flugfolio, tre belaspekta, presita en du koloroj, estas verkita en ses lingvoj: angla, franca, germana, hispana, itala kaj sveda. La nacilingvaj tradukojn prizorgis kompetentaj kunlaborantoj de CED, tiel ke ankaŭ tiurilate ĝi estas senripoĉa.

Por eldono de la flugfolio Sinjoro Charles Thollet el Maroko donacis la konsiderindan sumon de 80.000 fr.fr. Proksimume same altan sumon kontribuis UEA. La estraro decidis fiksi la prezon de la flugfolio tiel, ke per plena disvendo estu kovritaj ĉiuj preskostoj kaj ekspedaj elspezoj. Sekve 1000 ekzempleroj de la flugfolio kostas 40.— gld. aŭ 4000 fr.fr. aŭ £ 4 aŭ egalvaloron de 40.— ned. gld. La flugfoliojn oni mendu ĉe la *Administra Oficejo de UEA*, Eendrachtsweg 7, Rotterdam. C. Nederlando.

La Informa Fakto de UEA esperas, ke la landaj centroj de informado mendos plurajn milojn de la flugfolio kaj vaste utiligos ĝin por distribuo al la membroj de internaciaj konferencoj kaj kongresoj, kiuj en tiu ĉi jaro estos tre multnombraj. Estus ankaŭ dezirinde, ke unuopaj esperantistoj, precipe tiuj, kiuj mem partoprenos neesperantistajn kongresojn kaj konferencojn, havigu al si sufiĉan kvanton da flugfolioj.

La Administra Oficejo ne povos plenumi mendojn de malpli ol 250 ekzempleroj.

La Informa Fakto de UEA atentigas, ke estas ĝia intenco regule eldonadi modernajn kaj aktualajn flugfoliojn, se tiu ĉi unua provo montriĝos sukcesa. Ju pli baldaŭ disvendiĝos kaj disdoniĝos la ĵus publikigita flugfolio, des pli baldaŭ aperos nova per la reenkasigita kapitaletto, kiu formas konstantan eldonan fondadon por flugfolioj.

KAMPANJO POR APOGANTOJ

Laŭ la nova statuto (par. 12) kaj ĝenerala regularo (par. 3), Apoganto estas persono, kiu apogas la celojn de UEA kaj kiu pagas unufoje por ĉiam kotizon, difinitan de la Komitato. Tiu kotizo estas fiksita kiel baza kotizo je 5 ned. guldenoj. La kotizoj por la aliaj landoj estas proksimume adekvataj al tiu baza kotizo, sed ne precize egalaj, ĉar pro praktikaj kaj psikologiaj kaŭzoj montriĝis necese havi rondajn ciferojn. Tiel, ekz., la kotizo por Francaj teritorioj estas 500 fr.fr., por Britujo 10 ang. sil., ktp.

La Estraro decidis, realigante la instrukciojn de la Komitato, entrepreni grandskalan mondan kampanjon por havigi al UEA kiel eble plej multe da apogantoj inter la neesperantistoj. En la

landoj, kie ekzistas aliĝinta landa asocio, la kampanjon organizos tiu asocio. En la aliaj landoj la ĉefdelegitoj aŭ perantoj prizorgos la kampanjon. Kompreneble, la Estraro estas konvinkita ke ĉiu individua membro aktive partoprenos en tiu grava laboro.

Ĉiu apoganto ricevas specialan numeritan ateston pri sia pago. La atestoj estas ĵus presitaj kaj haveblaj en libretoj de po 10 ekzempleroj. Sekve, la minimuma kvanto, kiun oni povas mendi, estas unu libreto kun dek atestoj, kies valoro estas 50 ned. gld. Ĉiu mendinto respondecas pri tiu sumo por ĉiu mendita libreto. Detalaj instrukcioj pri ĉio rilate la varbadon de Apogantoj troviĝas sur la kovriloj de la libreto kun la atestoj.

Varbu Apogantojn de UEA inter viaj amikoj kaj konatoj-neesperantistoj! Partoprenu amase en la kampanjo! Ĉiu individua membro de UEA havu la celon havigi al la Asocio almenaŭ dek Apogantojn.

Por honorigi la plej agemajn kunlaborantojn en tiu ĉi kampanjo, la Estraro decidis ke ĉiu, kiu varbos 100 Apogantojn, ricevos specialan honoran mencion en la Revuo kaj libropremion en valoro de 50 ned. guld. laŭ sia propra elekto.

FONDAJO UNIVERSALA EKSPOZICIO

Estas konate, ke la granda Universala Ekspozicio, aranĝita en Nov./Dec. 1954 en Montevideo okaze de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, brile sukcesis. Ĝi altiris la atenton ne nur de la diversaj delegacioj, sed ankaŭ de la larĝa publiko. Tiu ekspozicio estis kaj estas la plej laŭta dokumento pri la akiraĵoj kaj kulturaj valoroj de la Internacia Lingvo.

En la momento, kiam vi legas tiujn ĉi liniojn, la ekspozicio jam troviĝas survoje al Eŭropo. Okaze de la sekvanta Sesio de la Eŭropa Konsulta Asembleo en Strasbourĝ, ĝi estos prezentita al la Eŭropaj reprezentantoj kaj al la publiko en la Eŭropo-Domo. Estas superflue akcenti la eksterordinaran gravecon de tiu fakto. Poste la ekspozicio estos prezentita en diversaj aliaj urboj de Eŭropo.

La elspezoj por transporto kaj aranĝado de la ekspozicio estas konsiderindaj. La Estraro de UEA dum sia lasta kunsido voĉdonis subvenciojn de £100, sed tiu sumo povas kovri nur relative malgrandan parton de la kostoj. Tial la Estraro decidis formi specialan fondacion sub la nomo „Fondajo Universala Ekspozicio” kaj peti la esperantistaron finance kontribui al tiu fondajo. La donacojn por tiu celo oni povas sendi al la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA en diversaj landoj aŭ rekte al la Administra Oficejo de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C, Nederlando.

La aranĝadon de la ekspozicio prizorgas la Centro de Esploro kaj Dokumentado en Londono kunlaborante kun la Sekretariato de la Eŭropa Konsilantaro kaj kun la loka ekspozicia komitato en Strasbourĝ.

kigo de D-ro L. L. Zamenhof, por la unua fojo en la tuta historio de UEA la nombro de ĝia membraro transpasis la ciferon 20.000!

En tiaj kondiĉoj estis necese ke la Estraro de la Asocio kunvenu ĉijare multe pli frue ol kutime por fiksi ĉiujn detalojn de novaj aktivecoj entreprenotaj en la sekvantaj semajnoj kaj monatoj.

La kunsido daŭris du tagojn, la 28-an kaj 29-an de decembro. Prezidis Sinjoro E. Malmgren kaj ĉeestis la vic-prezidanto, Sinjoro D. Kennedy, la ĝenerala sekretario D-ro I. Lapenna, Sinjoro P. M. Mabesoone, estrarano pri financoj, Sinjoro R. Llech-Walter, estrarano pri kongresoj kaj la administranto, F.ino M. H. Vermaas. La diskuto pri Eŭropaj problemoj partoprenis ankaŭ D-ro W. Herrmann. Por la unua fojo la eksterlandaj estraranoj havis la okazon vidi la novan belegan kaj tre taŭgan oficejon de UEA en Rotterdam, kie kompreneble okazis la kunsidoj en speciala kunsida salono.

La unua pritraktita demando estis tiu de la financa situacio. Sinjoro Mabesoone donis klaran analizon kaj laŭ lia propono la Estraro decidis publikigi ĉijare, escepte, du bilancojn: unu laŭ la stato en la momento de la translokiĝo kaj la alian laŭ la stato je la 31-a de decembro 1955. La publikigo de la unua bilanco montriĝis necesa por ebligi al la Komitato kaj al la tuta membraro ricevi absolute klaran bildon pri la financoj de la Asocio en la momento de transpreno fare de la novaj funkciuloj kaj oficistoj.

La ĝenerala sekretario donis raporton pri la stato de informado en la mondo, pri rilatoj de la Asocio kun la interŝtataj kaj internaciaj organizaĵoj kaj pri la laboroj de CED. Aldonajn informojn koncerne Eŭropan Konsilantaron donis D-ro Herrmann. Post profunda ekzameno de la situacio la Estraro faris plurajn decidojn pri la pluaj aktivecoj de la Asocio ĉe la Eŭropa Konsilantaro. Interalie, la granda Universala Ekspozicio el Montevideo estos transportita al Strasbourĝ kaj prezentita tie, en interkonsento kun la Sekretariato de la Eŭropa Konsilantaro, en la Eŭropo-Domo mem dum la sekvanta Sesio de la Asembleo, verŝajne en Majo. Tiucele la Estraro disponigis £100 el Fondajo-UEA kaj decidis alvoki la esperantistaron finance kontribui por la nova „Fondajo-Ekspozicio”.

Dank'al Sinjoro Charles Thollet el Maroko, kiu donacis la grandan sumon de 80.000 francaj frankoj por la eldono de speciala flugfolio direktita ĉefe al la neesperantistaj internaciaj kongresoj, la Estraro fine havis la eblecon publikigi tiun ĉi gravan propagandilon. Pri tio oni legu apartan informon en tiu ĉi numero de la Revuo. Cetere, en unu el la sekvantaj numeroj aperos detala raporto pri la tuta laboro, farita sur la kampo de informado en la pasinta jaro.

Aliflanke la Estraro kun aprobo aŭdis pri la aktiveco de CED, aparte pri la franca traduko de la verko La Internacia Lingvo, Faktoj pri Esperanto, kies manuskripto estas preskaŭ preta. Inter la aliaj laboroj, CED baldaŭ eldonos specialan ampleksan dokumenton en kiu estos donitaj kompetentaj respondoj al diversaj antaŭjuĝoj rilate Esperanton. Se necese, CED eldonos plian specialan dokumenton pri la lingva problemo en Eŭropo kaj la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo. Al la dokumenta laboro kaj al informado multe helpos la ĵus eldonita disko kun paroladetoj de 23 reprezentantoj el diversaj landoj dum la Bolonja Kongreso. La Estraro esprimis sian dankon al la prezidanto, kiu sukcesis realigi tiun ideon en kunlaboro kun sinjoroj V. Setälä kaj Bengt Joelsson.

Unu el la ĉefaj punktoj de la tagordo estis la instruado de Esperanto en la lernejoj. Jam estas kolektita abunda dokumenta materialo, kiun sendis diversaj landaj asocioj. Ankaŭ la enketoj, kiujn en la nomo de CED gvidas Sinjoro D. Kennedy, jam donis sufiĉe konten-

tigajn rezultojn. Alvenis pli ol 300 respondoj de instruistoj-esperantistoj kaj pli ol 80 de lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata. La Estraro komisiis la ĝeneralan sekretario informi kiel eble plej baldaŭ la landajn asociojn pri la nuna stato en tiu sfero kaj faris sugestojn pri la entreprenotaj paŝoj.

Laŭ la ampleksa raporto de la KKS, Sinjoro G. C. Fighiera, la pre-laboroj por la Kongreso promesas altnivelan manifestacion. La Estraro aprobis la provizoran programon kaj atendas, ke la KKS, en kunlaboro kun la LKK, donos al la Kongreso fortan laboran karakteron kaj altvaloran kulturan enhavon. Pri la kongresurbo por la jaro 1957 ankoraŭ ne estas farita decido.

Kiam komenciĝis la diskuto pri la Revuo, sur la tablo jam troviĝis la januara numero. La nova formato, la moderna aspekto, la interna aranĝo farita kun multe da arta gusto kaj la ekvilibrita diverseco de la interesa enhavo elvokis unuaniman gratulon al la Redaktoro.

Konscia, ke ju pli forta estas UEA, des pli efike ĝi povas agi por la antaŭenigo de la Internacia Lingvo, la Estraro decidis apelacii al ĉiuj landaj asocioj, ĉefdelegitoj, delegitoj kaj individuaj membroj, intensigi la varbadon de novaj membroj por la Asocio. Se ĉiu faros sian eblon kaj se ĉiu nuna membro restos fidela, la Asocio povas ankoraŭ multe altigi la nombron de sia membraro. Krome, la kunsido decidis komenci grandskalan kampanjon por havigi al la Asocio kiel eble plej multe da Apogantoj (vidu specialan informon). Dum la kunsidoj estis pridiskutitaj ankaŭ pluraj aliaj aktualaj demandoj, ekz. la plibonigo de la libroservo, eldono de la Jarlibro (marto 1956), utiligo de la mono ricevota per la vendo de la domo en Heronsgate, disvastigo de Esperanto en la neesperantistaj internaciaj organizaĵoj kaj kongresoj, jura personeco de la Asocio, biblioteko en Genevo kaj kelkaj aliaj malpli gravaj.

La kunsidojn animis spirito de serena optimismo kaj firma volo realigi kiel eble plej baldaŭ ĉiujn taskojn kaj laborojn, kiujn enhavas la baza Laborprogramo de UEA kaj kiujn ĉiam pli altrudas la lingva situacio en la internaciaj rilatoj.

I. L.

Esperanto en la Lernejon

Sukceso en Slovenujo

Laŭ propono de la Esperanto-Ligo de Slovenujo pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn, la Konsilantaro por Klerigo kaj Kulturo je 25 okt. 1955 akceptis la jenan decidon, validan por Slovenujo:

„Principe estas aprobita fakultativa instruado de esperanto en ĉiuspecaj lernejoj. Por koncerna lernejo devas laŭ propono de la lerneja estraro doni la aprobon la kompetenta lerneja administra instanco.

Kiel instruisto por la esperanto-kursoj povas esti dungita persono kun plena mezlerneja instruiteco kaj kun diplomo pri C-ekzameno ĉe Instituto por Internacia Lingvo Esperanto. Al la instruistoj de Esperanto oni pagas honorarion pohore laŭ la regularo de laboro valida por kleriga kaj scienca fakoj.

La Konsilantaro aprobas kiel lernolibron „Esperanto” de Rudolf Rakuŝa.”

UEA sincere gratulas niajn samideanojn en Slovenujo pro tiu bela sukceso! Ni esperas, ke baldaŭ aliaj landoj sekvos la ekzemplon.

SOLENAĴOJ OKAZE DE LA OFICIALA INAŬGURO DE LA NOVA OFICEJO

Kvankam nia nova Administra Oficejo en Roterdam funkcias jam de la 15-a de Novembro, tamen estis necese fari ankoraŭ multajn internajn riparojn kaj adaptojn, por ke ĝi povu plene taŭgi al sia celo. Dank' al sindona laboro de la roterdamaj esperantistoj, kiuj en liberaj horoj, dum la vesperoj kaj dimanĉoj, diversmaniere donis sian helpon, ĉio povis esti preta por akcepti la unuan estraran kunsidon en la nova hejmo.

Gazetara Konferenco

Ĉar la oficejo ne havas salonon por 50-60 personoj, la solenaĵo de la Inaŭguro kaj la gazetara konferenco, aranĝita antaŭ la solenaĵo, okazis en la salonoj de la apuda granda restoracio Caland-West. La Gazetaran Konferencon partoprenis ĉiuj estraranoj kaj la reprezentantoj de la grandaj lokaj gazetoj. La estraranoj respondis, ĉiu laŭ sia fako, al multnombraj demandoj de la ĵurnalistoj koncerne la progresojn de Esperanto en la lastaj jaroj. Ili precipe interesiĝis pri la rezolucio de UNESKO,

pri la stato de Esperanto en diversaj landoj, aparte en tiuj de orient-Eŭropo, kaj pri la instruado de la lingvo en la lernejoj.

La Inaŭguro

Tuj post la gazetara konferenco okazis la solena Inaŭguro de la nova oficejo. Unue F.ino M. H. Vermaas diris kelkajn enkondukajn vortojn, per kiuj ŝi bonvenigis la urbestron de Rotterdam, la Estraron kaj la reprezentantojn de diversaj organizaĵoj. La prezidanto de UEA, Sinjoro E. Malmgren, alparolis speciale la urbestron kaj esprimis sian ĝojon, ke ĝuste en Rotterdam, tiel grava trafikcentro, la Asocio trovis sian novan hejmon. Li transdonis la parolon al Sinjoro Mag. G. E. van Walsum, la urbestro de Rotterdam, por ke li faru la inaŭguran paroladon. La urbestro akcentis, ke Rotterdam tre ofte akceptas eksterlandanojn, ke pli vigla internacia kontakto estas ege necesa kaj ke li mem ofte spertis la urĝan bezonon de komuna komunikilo. Li bone komprenis, ke la strebadoj de

la Esperanto-Movado ne estas inspiritaj de la nura deziro doni al la homoj simplan teknikan instrumenton de interkompreniĝo, sed ke pli profundaj idealoj estas ligitaj al la ideo de komuna lingvo. Responde al la vortoj de F.ino Vermaas, kiu en la komenco parolis pri la ĝemeliĝo de Bologna kaj Boulogne per Esperanto kaj kiu sugestis similan ĝemeliĝon inter la du grandaj havenurboj, Bordeaux kaj Rotterdam, Sinjoro van Walsum diris, ke li estas inklina al tiu ideo. Fine, la urbestro forprenis kurteneton de antaŭ granda foto de la nova oficejo kaj tiamaniere simbole inaŭguris ĝin.

Sekvis longa vico da gratulantoj, kiuj parolis en la nomo de multaj internaciaj, landaj kaj lokaj Esperanto-organizaĵoj. Kelkaj el ili akompanis siajn vortojn per belaj kaj utilaj donacoj por la nova oficejo. Parolis i.a. la reprezentantoj de KELI (S-ro Brakel), Internacia Komisiono por Esperanto kaj Sociologio (Prof. Prins), Akademio de Esperanto (Inĝ. Isbrucker), Heroldo (Teo Jung), La Nederlanda landa asocio (S-ro Blokker), Federacio de Laboristaj Esperantistoj (S.ino Mes), Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj (S-ro Krikke), lokaj Esperanto-grupoj (S-ro Telling), Roterdama kunlabora komitato (S-ro Bouwman). En la nomo de UEA Sinjoro Malmgren kore dankis al F.ino Vermaas kaj al Roterdamaj esperantistoj pro la belega aranĝo de la oficejo, pri kiu nun prave povas fieri ĉiu esperantisto. Li ankaŭ esprimis sian dankon al ĉiuj parolintoj kaj diris ke harmonia kunlaboro de ĉiuj branĉoj kaj fakoj de la Esperanto-Movado estas tre necesa por la plua sukceso de Esperanto.

Fine de la solenaĵo Prof. Ivo Lapenna, la ĝenerala sekretario de UEA, faris mallongan paroladon pri la perspektivoj de la Internacia Lingvo en la hodiaŭa mondo. Parolante pri la estonteco en funkcia rilato kun la pasinteco, li skizis la vojon de plua interna evoluo kaj ekstera disvastiĝo de la Internacia Lingvo kaj montris per fortaj argumentoj — ne surbaze de esperoj aŭ deziroj sed surbaze de scienca analizo — la absolutan certecon de ĝia fina enkondukiĝo en ĉiujn internaciajn rilatojn.

Honorigo de la helpantoj

Post la solenaĵo en Caland-West ĉiuj ĉeestintoj havis la okazon viziti la oficejon, dum la estraro daŭrigis sian kunsidon en speciala saloneto. Vespere en la teretaĝa akceptejo estis intima kunveno inter la estraranoj kaj ĉiuj roterdamaj geesperantistoj kiuj helpis aranĝi la domon. La prezidanto menciis la meritojn de ĉiu el ili unuope kaj kiel dankesprimon donacis al ĉiu valoran libron kun subskriboj de la estraranoj. Speciale li menciis la grandajn laborojn, kiujn faris sinjoro J. Th. de Goeij dum plenaj du monatoj en ĉiu libera momento, kelkfoje eĉ en profunda nokto. Por hono-

rigi tiun elstaran kaj ekzemplan sindonemon la Estraro — diris la prezidanto — decidis doni al S-ro de Goeij Dumvivan Membrecon de UEA.

La lingva problemo en Eŭropo

La morgaŭan tagon, la 29-an de decembro, estis aranĝita en Hotel des Indes en Hago — unu el la plej luksaj hoteloj de Nederlando — granda gazetara konferenco kun la celo prezenti la lingvan problemon en Eŭropo kaj la signifon de la konata propono de 14 reprezentantoj en la Eŭropa Konsulta Asembleo, pri eksperimenta enkonduko de Esperanto en kelkajn lernejojn de kvin Eŭropaj landoj (Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando). Tiun konferencon kaj la bankedon ligitan al ĝi organizis kaj persone financis Gesinjoroj Julia kaj I. R. G. Isbrucker en la nomo de nederlanda sekcio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado en Londono. Entute ĉeestis pli ol 40 personoj, inter kiuj la urbestro de Arnhem, Sinjoro Matser, la eksurbestro de tiu urbo kaj de Hago, S-ro Mag. de Monchy, pluraj urbaj konsilanoj kaj granda nombro da ĵurnalistoj, reprezentantaj la tutan nederlandan gazetaron kaj la ĉefajn presagentejojn. Estis unu el la plej grandaj gazetara konferencoj, kiujn iam organizis la Esperanto-Movado. Kompreneble, ĉeestis ankaŭ la tuta estraro de UEA, D-ro Herrmann, la prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio kaj komisiito por la Eŭropa kampanjo, la administranto de la oficejo en Rotterdam.

Dum la konferenco Prof. Ivo Lapenna, la Direktoro de CED, eksplikis mallonge la lingvajn malfacilaĵojn en Eŭropo kaj la ĉiam pli grandan interesiĝon en la medioj de la Eŭropa Konsilantaro por la solvo, kiun prezentas la Internacia Lingvo. Parolis ankaŭ la urbestro de Arnhem, kiu diris, ke la tiea urba konsilantaro, sentante forte la lingvajn malfacilaĵojn, decidis kunvoki kaj financi dum la semajno antaŭ Pentekosto lingvistan konferencon en formo de ronda tablo. Pri tio donis detalajn informojn D-ro Verkade, kiu diris, ke ankaŭ la Esperanto-movado estos reprezentita pere de kompetentaj scienculoj, nomotaj de CED. D-ro Herrmann parolis pri la Eŭropa Kampanjo.

Dum la bankedo mem viciĝis multaj parolantoj kaj fine la prezidanto de UEA, S-ro Malmgren, dankis al Ges. Isbrucker pro la brila aranĝo.

Ĉiujn paroladojn de la diversaj solenaĵoj tradukis en la nederlandan aŭ Esperantan lingvon F.ino Vermaas. Si tion faris tiel lerte kaj rapide, ke tio per si mem ne povis ne impresi la neesperantistajn ĉeestantojn koncerne la esprimeblecojn de la Internacia Lingvo.

La tuta nederlanda gazetaro vaste raportis pri la Inaŭguro en Rotterdam kaj pri la konferenco en Hago.

R. LI-W

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

Aŭstrujo

Post la morto de nia samideano poŝtdirektoro Dworschak, oni forigis de sur la belaj oficialaj ilustritaj poŝtkartoj la esperantan tekston, kiu dum longe staris apud tekstoj en germana, angla kaj franca lingvoj. Oni motivigis tion laŭ preteksto, ke „mankas spaco“; sed ke tio estas nur preteksto ĉiu povas kontroli, rigardante la novajn kartojn, sur kiuj troviĝas pli ol sufiĉe da spaco por eĉ du esperantaj tekstoj! Ni devas rekoni, ke reakciaj fortoj sukcesis ĉi-foje nian aferon almenaŭ provizore malutili; sed ankaŭ sian aferon ili ne domaĝis malutili, ĉar la malnovaj kartoj kun esperanta teksto bonege efikis tra la tuta mondo.

Helpus al la restarigo de la antaŭa pozicio se multaj eksterlandaj esperantistoj skribus al la koncerna D-ro Schachinger, Direktoro, Generalpostdirektion, Wien I, bedaŭrante la malaperon de la E-teksto, kaj petante la restarigon de tiu teksto sub la bildoj.

Britujo

La 15an de decembro la britaj esperantistoj ricevis unikan okazon trafe propagandi nian lingvon, kaj bedaŭrinde ili maltrafis ĝin. La ĝenerale malsimpatia oficiala brita radio B.B.C. permesis, ke esperantisto dum duonhoro prezentu Esperanton kaj ĝin defendu kontraŭ la kritikado de konata angla verkistino kaj de universitatulo. En tiu ĉi boksado nia angla reprezentanto ne havis sufiĉe da pezo, kaj estis plene venkita. Li ŝajne ne komprenis, ke kontraŭ intelektuloj oni devas uzi intelektajn, aŭ almenaŭ inteligen-

tajn, argumentojn. Anstataŭ tio, unu kontraŭulo povis prave plendi, ke li ricevis „absolute nian respondon“ al sia demando! La esperantisto, eĉ ne sukcesis pruvi, ke fakte ekzistas lingva problemo. Demandite pri la utileco de Esperanto, li dufoje limigis sin al la grava problemo de „ferioj“; pri la socia rolo de la internacia lingvo, pri ĝia apliko al la problemo de mondopaco aŭ pri ĝia neceso por la tutmonda disvastigo de scienca kaj kultura konoj li respondis eĉ ne unu vorton! Kun malespero oni konstatas, ke nur vane estas verkitaj la libroj „Retoriko“ kaj „Internacia Lingvo“... Li ne povis mencii eĉ unu internacian konferencon, ĉe kiu sentiĝis lingvaj, malfacilaĵoj (kvankam okazis multaj, laŭ atesto de la partoprenintoj neesperantistaj mem). Kiam persista demandado devigis lin finfine mencii nian literaturon, li diris (al konata verkistino!) ke Esperanto „bedaŭrinde“ havas poetojn! Pri la sinteno de UNESKO al nia afero li tute ne aludis, kvankam ĝi certe imponus al tiaj kulturaj personoj. Entute oni ricevis de nia reprezentanto mem impreson pri la malplivaloro de nia lingvo, kaj oni certe ne povas kulpigi la kontraŭulojn, ke ili ne estas varbitaj al nia afero. Ili ne estis devigataj *respekti* nian aferon, kaj ilia malrespekto speguliĝis en ilia sinteno ĝentila sed nese-rioza.

Ni ricevis perfektan lecionon, kiel ne propagandi nian lingvon en kulturaj rondo. Estas necese raporti tiel draste pri la afero, ĉar certe BBC ne ricevis motivon por pli simpatia sinteno al Esperanto, kaj tiu ĉi maltrafo perdigis al ni okazon, kiu ne baldaŭ ripetiĝos.

Redakcia Informo

Ni firme intencas, ke ĉiu numero de nia Revuo aperos akurate je la 1-a de ĉiu monato, kaj en tio ĉi nia nova presisto solidare nin apogas. Sed por tion certigi, ni devas pretigi la tutan materialon ĝis absolute plej laste la 1-a de la antaŭa monato. Ni tial petas niajn kunlaborantojn aranĝi, ke materialo por difinita numero atingu nin *antaŭ* tiu dato (antaŭ la 1-a de marto por la aprila numero, k.s.). Ni devos rigore apliki tiun limdaton, ĉar ni opinias, ke akurata aperigo de la Revuo estas grava servo al la anoj.

Ĉeĥoslovakio

En Praha aperas brajle presita porblindula Esperanto-organo „Aŭroro“. Ĝi estas fondita en 1920 kaj estas do unu el la malnovaj Esperanto-gazetoj. Ĝia aperado estis interrompita dum la milito, sed de post 1945 ĝi daŭre kaj regule aperas kaj sukcesis transvivi la periodon de malfavora sinteno kontraŭ Esperanto, kiam ĉiuj ceteraj Esperanto-gazetoj en Ĉeĥoslovakio ĉesis aperi. Nun aperas la 29a jarkolekto de „Aŭroro“.

„Aŭroro“ aperadis kvinfoje jare, en 150 ekzempleroj, sed ekde 1956 la eldonkomitato decidis pli grandigi ĝian eldonnombron, aperigi ĝin sesfoje jare kaj, samtempe, sendadi ĝin senpage al ĉiuj nevidantaj esperantistoj alilandaj, kiuj tiucele sendos siajn adresojn.

La eldonanto de „Aŭroro“ estas la Ĉeĥoslovaka Ligo de Invalidoj. Adreso: „Aŭroro“, Slepcká knihovna, Krakovská 21, Praha 2, Ĉeĥoslovakio.

Grekujo

En la greka jurnalo „Anexartisia“ de la 21a de novembro 1955 aperis la novelo „Ses leteroj“ de Jean Forge (vd. ESPERANTO, Oktobro 1955, p. 281) en greka traduko de s-ano Ioanis P. Kaloumenos.

Portugalujo

En la jurnalo *Diario de Lisboa* (Lisbono) de la 14a de novembro aperis dukolumna rubriko „Por esse Mundo...“ (Kroniko Esperantista) super la nomo de nia malnova kolego Saldanha Carreira. Ĝi enhavis (portugallingve) esperanto-novaĵojn el 11 landoj.

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.
Telefono: ARNold 90-81

ESPERANTO-TRADUKOJ EN INDEX TRANSLATIONUM

Kiel ni informis en la maja numero de „Esperanto”, UNESKO daŭrigis la laboron de la Instituto por Internacia Intelekta Kooperado kaj regule eldonas Bibliografion de tradukoj el diversaj lingvoj. Ĝis nun UNESKO eldonis 7 volumojn. En la ĝisnunaj eldonoj la Esperantaj tradukoj estis malbone kaj manke enlistigitaj. Krome, en la titoloj de la Esperantlingvaj tradukoj ofte troviĝis diversaj prezeraroj.

Pro la graveco de Index Translationum — verko kiu troviĝas en ĉiuj bibliotekoj kaj kulturaj institucioj de la mondo — CED entreprenis la necesajn paŝojn, por ke en la estonteco la Esperantaj tradukoj estu objekte listigitaj en la verko.

Estis necese kolekti informojn pri ĉiuj Esperantlingvaj tradukoj aperintaj post la lasta mondmilito, ordigi la tutan materialon kaj prezenti ĝin en formo respondanta al la bezonoj de la redakcio de Index Translationum. Tiun gravegan taskon ricevis la kunlaboranto de CED por literaturaj demandoj, s-ro W. Auld. Li organizis la tutan laboron, trovis kompetentajn kunlaborantojn kaj plenumis la taskon en tre mallonga tempo. La ĵus finita verko enhavas tradukojn el literaturoj aŭstra, brazila, bulgara, ĉina, ĉeĥoslovaka, dana, finna, franca, germana, hungara, itala, japana, jugoslavia, nederlanda, norvega, portugala, hispana, sveda, svisa, de Unuigita Reĝlando kaj urugvaja. Por ĉiu lando la tradukoj estas klasigitaj laŭ la diversaj fakoj, same kiel en Index Translationum. Ĉiu ero enhavas ĉiujn elementojn, kiujn mencias Index Translationum.

Al s-ro W. Auld helpis kiel kunlaborantoj s-roj S. W. Ahlm, Pál Balkányi, M. C. Butler, M. de Freitas, C. C. Goldsmith, M. Ĝivoje, Esperantista Societo de Urugvajo, Ivan H. Krestanoff, Mijamoto-Masao, D-ro W. Perrenoud, D-ro T. Pumpr, F. D. Ramolfo, J. Régulo-Pérez, M. Salzmänn, S.A.T., V. Setälä, C. Stöp-Bowitz, D-ro F. Szilagyi, Poul Thorsen, Tramondo, Otto Walder, Geo. H. Yoxon. Dankon kaj gratulon al W. Auld kaj al liaj kunlaborintoj.

Unu ekzemplero de la verko estis sendita la 3-an de novembro al la redakcio de Index Translationum ĉe UNESKO. En sia letero de la 16-a de novembro s-ro H. M. Barnes, la direktoro de tiu fako ĉe UNESKO, skribis interalie: „Mi estas feliĉa, ke mi havas tiun materialon, ĉar ni estas finantaj la prepon de la oka volumo de Index Translationum.”

ENKETO PRI LA GEINSTRUISTOJ- ESPERANTISTOJ

En la septembra kaj novembra numeroj de „Esperanto” — kaj ankaŭ en kelkaj aliaj gazetoj — aperis alvoko al geinstruistoj-esperantistoj kun la peto respondi al la du enketoj. Ĝis la 30-a de novembro alvenis entute 269 respondoj al la enketo A/ kaj 67 respondoj al la enketo B/. Al ĉiuj respondintoj ni esprimas koran dankon, sed samtempe ni insiste petas ĉiujn aliajn geinstruistojn-esperantistojn, ke ili helpu CED kaj la Movadon en tiu enketo, gravega por la baldaŭaj klopodoj de ŬEA en la lernejoj. La demandoj aperis en la septembra numero de „Esperanto”, p. 267. Ĉiujn respondojn oni bonvolu sendi al kunlaboranto de CED por lernejar aferoj s-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo. La respondoj atingu s-ron Kennedy plej malfrue la 31-an de marto.

ALIAJ AKTIVECOJ

CED ĵus entreprenis enketon pri stratoj kaj placoj kun la nomo Esperanto aŭ D-ro Zamenhof. La komisiito de CED por tiu afero, s-ro G. C. Fighiera, jam dissendis demandaron al ĉiuj landaj asocioj kaj aliaj kunlaborantoj. La rezultojn ni publikigos en unu el la sekvantaj numeroj. Alia enketo rilatas al starpunkto de diversaj registaroj koncerne Esperanton (komisiito G. C. Fighiera). La enketo pri Esperanto-libroj en publikaj bibliotekoj (komisiito s-ro Frans Winkel) estas daŭrigata. Nun CED preparas ampleksan dokumenton por kontraŭbatali la antaŭjuĝojn rilate Esperanton. Pri ĉiujn ĉi aktivecoj — kaj ankaŭ kelkaj aliaj, malpli gravaj — ni informos en la sekvantaj numeroj.

ADRESSANGO

Ni ankoraŭfoje atentigas, ke la nova adreso de la direktoro de CED estas: 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo. Ĉiujn korespondadojn rilate al CED bonvolu direkti al tiu adreso.

DONACOJ POR CED

	£	ŝ	p
Stato la 31-an de aŭgusto 1955	165	-	4 - 5
Anonima donaco, Britujo	1	-	0 - 0
S-ro E. Filippi, Italujo			5 - 8
S-ro D-ro R. Zeballos-Morales, Urugvajo	1	-	0 - 0
Esperanto-Klubo, Washington, U.S.A.	2	-	0 - 0
Esperanto-Klubo, Oslo, Norvegujo	3	-	0 - 0
S-ro M. Lewin, Britujo	2	-	12 - 0
S-ro L. Jolliet, Germanujo			4 - 9
Grupo de Edukistoj Esperantistaj, Francujo	19	-	8 - 0
S-ro Amando García Cortes, Hispanujo			10 - 0
S-ro C. D. Prewitt, Usono	1	-	0 - 0

S-ro E. L. Aitchison, Britujo	1 - 0 - 0
S-ro Merkel, Italujo	1 - 2 - 10
S-ro Kosutek, Germanujo	12 - 0
S-ro Hotchkin, Britujo	10 - 0
S-ro M. Lewin, Britujo (dua donaco)	2 - 12 - 0
Stato la 31-an de decembro 1955	<u>202 - 1 - 8</u>

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Tute specialan dankon al la Grupo de Esperantistaj Geedukistoj en Francujo pro la granda donaco de £19-8-0. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, 7, Eendrachtsweg, Rotterdam C., Nederlando. al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris X, Francujo, aŭ al CED rekte je la nomo de ĝia direktoro.

KIUJ LANDOJ HELPIS AL LABORO DE CED?

CED regule publikigis la nomojn de organizaĵoj kaj individuaj personoj, kiuj dum la jaro 1955 finance helpis al la laboroj de CED. Jen nun resumo laŭ la landoj:

	£	ŝ	p
Nederlando	57	9	3
Francujo	34	16	0
Britujo	28	10	0
Svedujo	27	15	2
Svislando	11	8	6
Aŭstralio	8	0	0
Siera-Leono	6	0	0
Jugoslavio	5	19	0
Novzelando	5	0	0
Usono	4	5	2
Germanujo	3	6	1
Hispanujo	3	2	0
Norvegujo	3	0	0
Italujo	1	18	3
Urugvajo	1	0	0
Portugalujo		5	0
Sudafriko		5	0
Aŭstrio		2	3
	<u>202</u>	<u>1</u>	<u>8</u>

Specialan meriton havas la nederlandaj esperantistoj, kiuj ĉijare kontribuis pli ol kvaronon de la tuta donacita sumo. Tre gratulindaj estas la nederlanda, sveda, svislanda, novzelandaj, aŭstralia kaj kroatia landaj asocioj, kaj la franca Grupo de Edukistoj Esperantistoj, kiuj organizis kolektadon de donacoj por CED.

CED deziras akcenti, ke ĝi ne estas organizaĵo de tiu aŭ alia lando, sed speciala institucio de UEA kaj de la tuta Movado, laboranta per sciencaj metodoj por la interesoj de la Internacia Lingvo. Ĉu la aliaj landoj ne povus imiti la ekzemplon de tiuj, kiuj ĉijare pleje kontribuis al la laboroj de CED?

INTERNACIA KONKURSO 1955

Stato je la 31-a de decembro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Germanujo	3700	6986	188.8
2. Jugoslavio	1750	2629	150.2
3. Usono	2300	3352	145.7
4. Izraelo	250	330	132.-
5. Japanujo	900	1182	131.6
6. Maroko	750	937	124.9
7. Aŭstrujo	1200	1485	123.8
8. Svedujo	5900	6893	116.8
9. Francujo	5100	5869	115.-
10. Kanado	300	345	115.-
11. Aŭstralio	1000	1145	114.5
12. Finnlando	2500	2872	114.9
13. Hispanujo	1600	1825	114.-
14. Danlando	2500	2765	110.6
15. Nederlando	4600	5074	110.3
16. Urugvajo	300	330	110.-
17. Svislando	1600	1740	108.75
18. Nov-Zelando	800	854	106.7
19. Brazilo	6400	6820	106.5
20. Italujo	2900	3025	104.3
21. Belgujo	2100	2135	101.7
22. Portugalujo	500	495	99.-
23. Norvegujo	2200	2142	97.3
24. Islando	350	330	94.3
25. Sudafriko	350	305	87.1
26. Meksikio	350	210	84.-
27. Britujo	9200	7608	82.7
28. Sarlando	250	180	72.-
29. Irlando	250	160	64.-
30. Kubo	250	150	60.-

La evoluo de la Internacia Konkurso en la lastaj monatoj kaj ĝia fina rezulto sendube estas surprizo por multaj. En la antaŭa monato Usono jam faris grandan salton supren pro la energia laboro de la nova ĉefdelegito, S-ro Parrish. Nun Germanujo faris ankoraŭ pli grandan salton kaj atingis la supron kun granda plimulto. Kaŭzis tion la fakto, ke aliĝis kolektive Germana Esperanto-Asocio kun 2711 membroj. Per tio GEA grave plifortikigas UEA kaj ĝi meritas nian dankon, gratulon kaj bonvenigon.

Sed, ne malpli varme ni dankas kaj gratulas al ĉiuj aliaj landoj, kiuj sukcesis atingi pli ol 100% de sia kvoto. Precipe ni direktas nin al Jugoslavio, kiu atingis eĉ iom pli ol 150% kaj al Usono, kiu restas nur malmulte sub tio. En ambaŭ landoj la ĉefdelegito kaj delegitoj modele laboris. Specialan gratulon meritas certe ankaŭ Izraelo kaj Japanujo, kiuj atingis altan lokon en la vico.

En tiu ĉi jaro okazos du konkursoj: unu por la fortaj kaj alia por la malpli fortaj landoj. Pro spacomanko ni devas prokrasti la detalojn ĝis la venonta numero. Sed jam daŭrigu vian energian varbadon!

Jiri Korinek
Sen homa mezuro

*Ho kiel grandas universo
kaj kiel eta estas mi
kaj sensignifa mia verso
kaj mia trist' kaj nostalgii'.*

*Ke tamen ega ŝajnas homo
al viruseto sur polver',
al centmilono de atomo,
kia miraklo kaj mister'?*

*Se mikrokosmo kosmon formas,
ne bagatelas homa sort',
en sekvoj eta kaŭz' enormas,
gravegas iam simpla vort'.*

*Samgravas eksplodeg' de astro
kaj ekrideto de knabin'
kaj nia ĝoj' aŭ zorgbalasto
en sentempeco kaj senfin'.*

*Ĉar samvaloras la sekundo
kaj mil lumjaroj en etern',
kaj fine nur en korprofundo
kuŝas de granda solvo kern'.*

Komuniko de S.A.E.

Sidejo: 67 Avenue Gambetta,
Paris-20.

La 29a Kongreso de SAT okazos de 24-30 julio en Beograd, ĉefurbo de Jugoslavio. Kun la decembra numero de „Sennaciulo”, la oficiala organo de SAT, estis dissendita Kongresa Aliĝilo; ĉi tiun neabonantoj povas peti al supra adreso sideja de la Asocio. La adreso de la Kongresa Sekretario estas: Branko Maksimović, Banjički Venac 10, Beograd. Kongresa kotizo: 2,40 dol. ĝis 30 aprilo (poste 3,00 dol.) Infanoj ĝis 15-jaraj partoprenas sen kotizpago; ili organizos sian 3-an Geknaban Kongreseton.

Radio Zagreb disaŭdigas ĉiun unuan jaŭdon de la monato informojn pri la preparo de la Kongreso.

Nia Voĉeto nomiĝas la sola Infan-gazeto Esperantista nuntempe aperanta, eldonata sub la aŭspicioj de SAT. Ilustrita; trimonata. En ĝi kunlaboras infanoj kaj „ge-onkloj”. Abonigu viajn infanojn, se ili eklernis Esperanton; tiel ili havos konstantan interligon kun alilandaj samaĝuloj. Centra adreso: Petro Louis, 96 rue de Nabécor, Nancy, Francujo. Jarabono: 120 ff. (0,34 dol.) Petu specimemon kun perant-listo al tiu adreso.

APO Agado en Proksima Oriento En Grekujo

En la monato junio ekvojaĝis la unua ekipo de APO, konsistanta el Tibor Sekelj, komitatano de UEA kaj ĝia speciala sendito por Afriko kaj Azio, kaj liaj du kunlaborantoj, f-ino Elsie Parson, el Bristol kaj s-ro Zeljko Takač, el Zagreb. Ilia unua laborkampo estis Grekujo.

La situacio estis malfacila, ĉar la du societoj, en Ateno kaj Saloniko ekzistis nur surpapere, kaj kelkaj el la esperantistoj eĉ klopodis konvinki la APO-anojn, ke ili ne iru al Grekujo, kaj poste, ke ili nenion entreprenu. Fine, kiam la senditaro tamen eklaboris aktive kaj energie, kelkaj grekaj gesamideanoj fariĝis iliaj bonaj kunlaborantoj. Inter ili mi menciu f-inon Heleni Polimeropoulou, s-ron Sokraton Sakeŝlaropoulos, kaj poste s-ron Kaloumenos, s-ron Argiropoulos, s-ron Mingas, f-inon Kula Polimeropoulou, kaj aliajn.

Niaj aktivecoj evoluis en tri direktojn: Publika informado, intervjuoj kun aŭtoritatoj kaj organizado de esperantistoj.

Koncerne la informadon de la publiko, vasta gazetara kampanjo estas entreprenita, kaj ĉiuj pli gravaj gazetoj raportis pri nia senditaro, ĝiaj celoj kaj pri Esperanto ĝenerale. La subskribinto prelegis plurfoje publike antaŭ multnombra publiko, kaj pri Esperanto, kaj pri aliaj temoj en Esperanto, kun traduko al greka lingvo, profitante la okazon por propagando.

El la intervjuoj la plej gravaj estis tiuj kun la Edukministro, kiu akceptis reldoni dekretan pri instruado de Esperanto en lernejoj, kaj promesis helpi la Movadon diversmaniere; kun la Ministro de la Prezidenteco, kiu sciigis pri niaj celoj; kun la ĉefo de kulturaj rilatoj de la Ministerio de Eksteraj Aferoj, kiu tre eksimpatias kun nia afero, kaj promesis subteni ĝin oportune, kaj kun la Ĝenerala Sekretario de la Nacia Unesko-Komisiono, kiu akceptis la proponon pri kunveno de reprezentantoj de tiu Komisiono kun reprezentantoj de la Esperanto-Movado por planumi komunan agadon.

Sur la organiza kampo pluraj kunvenoj estis organizitaj, kaj estas starigitaj regulaj societaj kunvenoj ĉiusemajne en Ateno kaj Saloniko, kaj en ambaŭ lokoj ekestis po du kursoj elementaj.

Post unu monato mi forveturis, dum restis en Ateno s-ro Takač kaj en Saloniko f-ino Parson por daŭrigi la laborojn, kaj de ilia laboro, kiel ankaŭ de la kunlaboro de la lokaj gesamideanoj dependos la pluj sukcesoj. Sed jam nun oni povas diri, ke la agado estis sukcesplena, kia ajn estu la posta evoluo de la aferoj.

La proksima laborkampo estas Turkujo, kien mi vojaĝos fine de decembro 1955. De tie mi daŭrigos la vojon suden, tra Afriko. Sendube estus multe pli efika la laboro se post mia foriro taŭgaj kunlaborantoj povus daŭrigi la agadon. Tiaj kunlaborantoj estas serĉataj. Ili estu bonaj esperantistoj, kapablaj gvidi rektmetodan kurson, bonaj organizantoj, havu almenaŭ modestajn vivrimedojn por la unua tempo, kaj disponu pri tempo. Tiaj personoj bonvolu sin anonci al mi. Jam ni danke kvitancis kelkajn mondonacojn. Plujajn bonvolu sendi por APO al la A.O. de UEA,

Tibor Sekelj

Kondina 24, Beograd, Jugoslavio

La Juna Penso nomiĝas la Informilo de la Junulfako de SAT. Gejunuloj petos specimemon al C. Kleinclauss, Lotissement Beauregard, Bât. B, Nancy, Francujo.

En marto aperos la 5a postmilita kajero de „Sennacieca Revuo”, 56 plus 4

paĝoj; ilustrita; artikoloj pri sociaj, literaturaj, filozofiaj, sciencaj temoj, lingvistiko, pedagogio, ktp. (Prezo: 200 fr. fr. aŭ 0,57 dol.) Oni abonas pere de la supra adreso; sed ne eblas sendi specimemon pro la amplekso kaj jareco de la kajeroj.

41-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago - Danlando

4. aŭgusto - 11. aŭgusto 1956

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 3

Januaro 1956

Adreso: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

Banko: Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

Postgirkonto: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.

Aliĝoj: Validas la kotizo ĝis fino de marto: danaj kronoj 43,— edzino 21,50, gejunuloj 14,50, studentoj 21,50. Individuaj membroj de UEA rajtas rabaton 7,—, edzino de kongresano 3,50.

Aliĝiloj: Bonvolu peti aliĝilojn ĉe via Landa Asocio.

Nova faka kunveno: Anoncin sin: Kristana Esperantista Ligo Internacia, Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando.

Blindula Kongreso: En la kadro de la 41-a Universala Kongreso en Kopenhago okazos la 26-a Internacia Kongreso de blindaj esperantistoj.

Kongresa Glumarko: Bonvolu mendi ĝin ĉe via Landa Asocio aŭ rekte ĉe la 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

Infana Kongreseto: Esperanto-parolantaj infanoj ĝis 13 jaroj povas partopreni ĝin. Loka Kongresa Komitato tre rekomendas aliĝi multnombre al tiu nova aranĝo, kiu celas kuraĝigi la uzon de Esperanto inter infanoj.

Dua Bulteno: Ĝi estos sendata al ĉiu kongresano en februaro kun plenaj informoj pri loĝigado kaj ekskursoj.

Tivoli: Dum la tuta kongresa semajno la kongresanoj ĝuos senpagan eniron en la faman parkon „Tivoli”, en Kopenhago.

Artikoloj: LKK petas vin sendi gazet-eltondaĵojn pri la 41-a Universala Kongreso aperintaj en naci-lingvaj gazetoj.

Rekompence vi ricevos esperant-lingvan prospekton.

Statistiko: (ĝis fino de decembro): Argentino 1, Aŭstralujo 3, Aŭstrujo 5, Belgujo 2, Brazilo 2,

Britujo 69, Ĉeĥoslovakujo 1, Danlando 171, Finnlando 6, Francujo 34, Germanujo 21, Hispanujo 11, Islando 7, Italujo 39, Jugoslavio 39, Kanado 2, Nederlando 19, Norda Rodezio 1, Norvegujo 39, Novzelando 1, Svedujo 96, Svi-

sujo 7, Turkujo 1, Usono 4.

Sumo: 581 el 24 landoj (pasintjare 452 el 25 landoj).

Lastmomenta informo:
1,000 aliĝis ĝis la 11-a de januaro.

Gian Carlo Figliera
Konstanta Kongresa Sekretario

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horosistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Dimanĉo	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (São Paulo), Brazilo.	
	23.00-23.30	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo.	
	12.30-13.00	La Coruña. 250m P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.	
Lundo	22.40-22.57	Hilversum. 298m, 188m, P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).	
	Mardo	00.45-01.00	San José. 192m P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
		11.55-12.00	Bern. 48.66m, 31.46m, 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern.
Merkredo	14.50-15.00	Ljubljana. 327m, 211m, K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.	
	17.35-17.40	Bern. 48.66m, 31.46m, 16.87m. P. D-ro Baur.	
	19.00-19.15	Stockholm, 42m, 25.63m. P. Radio I.B.R.A., Esperanto programo, Poŝtfako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).	
	19.15-19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.	
	15.30-15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m. P.	
	16.00-16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.	
	17.55-18.10	Roma. 50.34m, 41.15 m, 30.90m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.	
	21.55-22.05	Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.	
	22.15-22.20	Hilversum. 402m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.	
	Ĵaŭdo	06.45-06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
08.30-08.45		Paris. 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.	
11.55-12.00		Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.	
Vendredo	17.35-17.40	Bern. Kiel marde P. D-ro Privat.	
	22.30-23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.	
	22.45-23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.	
	00.45-01.00	San José. Kiel marde.	
	17.55-18.10	Roma. Kiel merkredo. P. D-ro Musella.	
	19.15-19.30	Carlet. Kiel marde.	
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 370m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala, Mez-Ameriko.	
	Sabato	11.15-11.30	Rio de Janeiro. 214m. K. Rádio Roquete Pinto PRD5, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
		17.30-18.00	Rio de Janeiro. 375m, 30.70m, 25.10m, 16.80m. K.I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
		18.45-19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
22.15-22.22	Hilversum. 298m, 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.		

Radio Roma. 1.II. Mondo esperantista; 3.II. Leterkesto kaj bibliografio; 8.II. Novajoj el Italujo; 10.II. Karnavalo; 15.II. Nia Gazeto; 17.II. Granda Fasto; 22.II. Tarquina: urbo etruska; 24.II. Madame de Staël kaj ŝia vojaĝo al Italujo (en la 150-a datreveno); 29.II. Romaj fontanoj (kun muziko)

Radio - Babiloj

(4)

La Esperantistoj havas la
dissendojn, kiujn ili meritas

Letero el Israelo (2)

En la oktobra n-ro de „Esperanto“ (p. 299) ni citis parton de letero de s-ro Gustav Hirsch el Naharia (Izraelo). Jen alia parto citinda:

„Mi regule aŭskultas Zagreb kaj nur tre tre malofte Hilversum. KIAL? Zagreb dissendas 15-minutajn programojn, kiuj plejparte interesas min. En tiuj programoj mi ofte aŭdas informojn pri la movado, kiujn mi sen tiuj dissendoj legus nur 8 semajnojn pli malfrue en esperantaj gazetoj. De tempo al tempo oni povas aŭskulti ankaŭ paroladon de eminentulo. Hilversum havas diversajn dissendojn. Unu el ili estas „socialistaj informoj“. Mi aŭskultis kaj aŭdis informojn, kiujn mi jam estis leginta kelkajn tagojn antaŭe en la gazetararo. Por aŭskulti nur 5 minutojn kaj eĉ nenion novan tute certe ne valoras interrompi la dormon. Simile estas pri la „katolikaj informoj“. Se mi estus katoliko, mi verŝajne ankaŭ en tiu dissendo aŭdis nenion novan. La dissendoj de N.C.R.V. havas grandan avantaĝon: ili daŭras kvaronhoron. Sed ĉar ili ĝenerale okazas nur unufoje en la monato kaj mi ricevis la gazeton kun la dato preskaŭ ĉiam nur post la dissendo, mi aŭskultas ankaŭ tiun dissendon nur tre malofte. La lasta n-ro de „Esperanto“ eĉ ne enhavis la daton, sed nur la rimarkon „nur unufoje ĉiumonate“. Ĉu oni ne povus dissendi ĉiusemajne je la sama tago (nokto) de la semajno, je la sama horo kaj la sama ondlongo kvaronhoran programon alternante katolikan, kristanan, socialistan kaj neŭtralan programon? Tiam mi regule aŭskultus ankaŭ Hilversum kaj certe tiel farus multaj aliaj samideanoj. La stacio ricevus tiom da dankleteroj, ke la daŭrigo de la dissendoj estus ekster danĝero, eble la stacio, post kelka tempo eĉ dediĉus pli da tempo al Esperanto.“

La radio-situaĉio en Nederlando

Responde al ĉi-supra letero de s-ro Hirsch, informante samtempe aliajn ĉelegantojn, ni sciigas jenon pri tiu situaĉio:

Komence fabriko de radio-aparatoj en Hilversum zorgis pri la dissendoj de radioprogramoj en Nederlando. Ĝi varbis gekontribuantojn inter la ĝeŭskultantoj por povi pagi la kostojn de la dissendoj. Poste tiuj gekontribuantoj fondis radio-disaŭdigan asocion, kiu zorgis pri la konsistigo de la radioprogramoj kaj la eldono de radioprogramgazeto. Tiu

ĝenerala asocio ankoraŭ ekzistas kaj nun nomiĝas AVRO. Ĝia estraro ne estas favora al Esperanto. Jam baldaŭ grupoj el la aŭskultantoj havis specialajn dezirojn, kiuj laŭ ili ne estis plenumataj de la ĝenerala asocio. Tial fondiĝis KRO (katolika asocio, kiu zorgas pri katolikaj diservoj perradiaj), NCRV (ortodoks-kristana asocio), kiuj alterne dissendas en la 1-a kaj 3-a kvaronjaroj per Hilvedsumo II, en la 2-a kaj 4-a kvaronjaroj per Hilversumo I, VARA (socialista asocio de laboristaj radio-amatoroj) kaj VPRO (liberkreda asocio), kiuj kun AVRO alterne uzas la sendilon Hilversum I (en la 1-a kaj 3-a kvaronjaroj) kaj Hilversum II (en la 2-a kaj 4-a). Interliga instanco estas Nederlandse Radio-Unie (N.R.U.), postbus 150, Hilversum (Ned.), al kiu ni ĉiuj sugestu kiel s-ro Hirsch.

Esperanto-radiodissendoj en Nederlando

Ni men jam atentigis la NRU (Nederlanda Radio-Unio), kiu kunordigas la radioprogramojn de la diversaj radio-asocioj en Nederlando, pri la dezirindeco kunordigi ankaŭ la Esperantoprogramojn de Hilversumo I kaj II laŭ la sugestoj de s-ro Hirsch.

Certe ne estos facile formi diverstendencajn duonhoran programon el la diversasociaj kvinminutaj kaj kvaronhora programeroj.

La NRU tamen sukcesas instigi la diverstendencajn asociojn dissendi komunajn muzikprogramojn interesajn por kiu homo ajn. Tial ni esperas, ke ĝi povos kunmeti longan varian Esperanto-programon regule ĉiusemajne dissendotan je fiksita horo en la sama tago.

Estus bone, ke ankaŭ eksterlandaj radio-ĝeŭskultantoj aŭfable petu per karto aŭ letero al NRRL, postbus 150, Hilversum (Nederlando), ke la Esperanto-dissendoj okazu ĉiusemajne en la komuna programo.

Bonvolu samtempe peti la saman instancan dissendi la Esperanto-kantaton „El la Vivo de Zamenhof“, teksto de prof. d-ro Edmond Privat kaj muziko de Frieso Molenaar. En la beneluxa kongreso en Utreĥto (Nederlando) pasintan pentekoston la unuafoja prezentado multe interesis la gekongresanojn.

Radio Zagreb

Ĉiuj aŭde oni povas aŭdi interesan programon el Zagreb. La malfrua horo estas maloportuna por multaj ĝeŭskultantoj, sed kiuj maldormos unufoje semajne ĝis noktmezo, ne bedaŭros la malfruan endormiĝon aŭskultinte radion Zagreb bone aŭdeblan tra la tuta Eŭropo, eĉ ekster ĝi.

S. J. de Jong

NIA FORUMO

Merrick Memoriga Fondajo

La blindularo tutmonda suferis severan baton pro la morto de nia 87-jara samideano W. P. Merrick, Shepperton, Anglujo, kiu dum multaj jaroj garantiis la publikigon de la brajla gazeto „Esp. Ligilo“. Ĉi tiu gazeto ja estas ligilo kaj lumigilo por samsortanoj en multaj landoj. Ni opinias, ke la plej bona tributo al Merrick estus, ke ni daŭrigus lian noblan taskon, nome, firmigi la financan bazon de „Esp. Ligilo“ per fondajo kiu nomiĝas „Merrick Memoriga Fondajo“. Kore ni petegas vian kunlaboron por realigi tiun celon. Sube troviĝas adreso de land-delegitoj kiuj tre volonte akceptos donacojn.

Argentino: S-ro J. Stang, Aldea Brasileria, Dep. Diamante (Prov. E.H.).

Aŭstrujo: S-ro R. Zoch, Hochstr. 23, Eggenburg, Nieder-österreich.

Danujo: S-ro P. Glygaard, Grøndalsvænge Alle 72, Köbenhavn F.

Finnlando: S-ro E. Juvonen, Pengerkatu II, Helsinki.

Franĉujo: S-ro R. Gonin, 7 Rue des Platanes, Lyons-III.

Germanujo: S-ro J. Kreitz, (22c) Köln-Ehrenfeld, Philippstr. 67.

Hispanujo: S-ro J. Jimenez, Lista 18, Madrid.

Italujo: S-ro Prof. G. Vassio, Corso Giulio Cesare 118, Torino.

Nederlando: S-ro R. Israels, 2, Exloermond.

Norvegujo: S-ro Alf. Arnesen, Jessnes.

Portugalujo: S-ro J. E. Castro, Largo dos Aviadores 97, Gaia.

Svedujo: S-ro B. Jacobson, Norevägen 4, Stocksund.

Svislando: S-ino B. Stäuble, Buchenstrasse 44, Basel.

Urugvajo: S-ro I. Marquez, Melo, Dep. Cerro Largo, Repub. Orien.

Sincere via,
Peter Wallace.

Kasisto de Esp. Ligilo.

52, Westacres Crescent, Newcastle-on-Tyne 5, Anglujo.

KONKURSO „BONSOIR L'EUROPE“

La limdato de tiu konkurso (vd. ESPERANTO, dec. 1955) estas prokrastita ĝis la 26-a de februaro. Daŭrigu do viajn klopodojn!

LA SOLDATO KIU MARŜAS

La soldato kiu marŝas
en la vento
en silento
sur la vojo kiu marĉas
sian korpon ne plu sentas.

Lia menso fakte brutas,
nur la laco
kaj l'agaco
de la pluvo kiu gutas
senkompate lin turmentas.

Kaj li iras plu malbene
pri la koto
sur la boto
kiu ĉiam pezas ĝene
kaj la vojon malglatigas,

dum suferi, monopole,
la kadenco
en la menso
regas ĉion malbonvole
kaj la povon pensi ligas.

Kaj li marŝas en la vico
uniforma
unuforma
sub vetera la malico
kaj la moko de l'serĝent'.

Li delonge jam maldormas
kaj oscedo
kun obsedo
en makzelo mem sin formas
pro nerezistebla tent'.

Se li povus eĉ almoze
ekricevi
rajton revii
kaj minuton nur ripoze
halti sur la voja bord'...

Sed li tion ne esperas
ĉar la revo
pro la devo
en soldato ne aperas:
jen la militserva sort'.

Jam tro pezas la pafilo
kaj la kasko
kaj la sako
kaj la kaĉo el argilo
gluiĝinta ĉe la ŝu'.

Sed la fora horizonto
plej perfide
malrapide
malebligis al renkonto
ĉiam foren fuĝas plu.

La soldato kiu, laca,
daŭre iras,
li sopiras
al ripoza vivo paca
sen ĉiama plua pel'.

Sed li sentas kun eknaŭzo
ke la vivo
en aktivo
daŭras ade kaj sen paŭzo
ĝis neatingebla cel'...

Kaj samkiel en armeo
la rezono
pri ordono
ne ekzistas pro obeo
kun neeblo de escept'.

tiel mankas la kompreno
pri l'motivo
de la vivo,
kaj nur eblas ĉi sinteno:
plua iro kaj akcept'.

Claude Piron

TEFI:

Leteroj

Jus mi eliris la tirkeston de
mia skribotablo kaj ektimiĝis: tie
kuŝas dekunu leteroj al kiuj mi
devas respondi. Dekunu leteroj
kun diversa formo kaj skribma-
niero. Dekunu!

Kion mi povas entrepreni?

Mi tiel maltrankviliĝis, ke mi
fermis la tirkeston kaj nun sidas
kaj penas forgesi la leterojn.

Ne respondi al leteroj, tio estas
denaska kutimo de plimulto inter
la homoj. Kontraŭ tio oni ne
povas lukti. Pli ĝuste: eblas; tamen
tre malfacile. Kaj estas ne pru-
dente, perdi fortojn por lukto kiu
malmulte da ĝojo promesas post
venko.

Mi ĝojas, ke mi povas dividi
mian opinion kun la legantoj, kaj
mi esperas, ke miaj vortoj trovos
aprobon ĉe multaj inter ili. La
okcidentanoj ne komprenus min.
Ili eĉ iĝas ridindaj ne povante
kompreni tion.

Iam, en Germanujo, en teatro

mi konatiĝis kun mia seĝnaj-
barino. Ni interparolis. Fine ŝi
petis mian adreson kaj la postan
tagon mi ricevis de ŝi inviton, kun
propono ke ni kune vizitu la zoo-
parkon. Mi ne deziris fari tian
viziton, kaj krome tiu konatiĝo ne
estis interesa por mi. Do, mi
simple ne respondis kaj estis
trankvila. Post du tagoj mi ricevis
de ŝi leteron. Ŝi petis, ke mi tuj
rakontu, kio okazis al mi. La plej
malbonan ŝi ne kuraĝas supozi,
sed ŝin turmentas plej teruraj an-
taŭsentoj. Aliel, kial mi ne res-
pondas — ja mi ne havis intencon
forveturi.

Mi tre konfuziĝis, kaj pro honto
mi decidis ne respondi al ŝia letero.
Post du tagoj mi ricevis novan
leteron. Ŝi eksciis, ke mi forve-
turis, kaj petas min, kiam oni
transsendos al mi ŝiajn leterojn,
mi sciigu al ŝi mian novan adreson.

Al ŝi tra la kapo eĉ ne pasis la
penso, ke ŝiaj leteroj estas ricevi-
taj kaj ke unu el ili, kvarfoje fal-
dita, kuŝas sub la tabla piedo, kaj
per la alia mi provas la feron por
frizado de miaj haroj. Honto!

Kial efektive mi ne respondas?
Ĉu estas tiel malfacile?

Mi prenos poŝtkarton, skribos
la adreson, poste kelkajn afablajn
vortojn, subskribos la karton kaj
metos ĝin en la leterkeston kaj
fino.

Ŝajne, tre facile. Tamen...

Unue, mi ne scias kiel estas kun
aliaj homoj, sed mi ĉiam havas ian
historion rilate la skribpaperon.
Mia skribpapero neniam koincidas
kun la dimensioj de la kovertoj.
Krome, por la letero mi ĉiam dis-
ponas pri unu difektita malnova
koverto.

Do, la skribpapero estas la
unua dorno en mia krono de bonaj
intencoj.

La dua dorno estas la adreso.

Kiam oni sciigas al mi novan
adreson, mi brulas je deziro tuj
memori ĝin, kaj pro tio mi ne
havas paciencon serĉi mian not-
kajeron, kaj skribas la adreson sur
peco da papero, sur cigareds-
katolo, aŭ sur sorbpapero, kaj ili
ĉiam perdiĝas.

La tria dorno estas la afranko.
Mi neniam portas kun mi poŝt-

markojn. Foje mi aĉetis dudek markojn kaj esperis per ili vivi ĝis la fino de mia vivo. Bedaŭrinde okazis, ke sur tiujn markojn hazarde versiĝis mia parfumo, kaj la markoj gluiĝis ĉiuj kune kaj neniam plu disiĝis unu de alia. Kaj glui la tutan kompanion sur unu solan leteron estis ne konvene, kaj mi forĵetis ilin kune.

La kvara dorno estas la sendo de la letero. Komisii pri tiu tasko iun el la servistoj ne ĉiam estas oportune. Oni tralegos la adreson kaj diros: "Aha!" Kaj persone meti la leteron en la poŝkeston estas por mi tre malfacile. Mi ne konas la aliajn homojn, tamen mi elirante el la domo povas rememori ĉion; kion vi volas — mian tutan pasintan vivon, la lecionon kiun mi lernis en la unua klaso kaj ankoraŭ tiam forgesis, ĉion — sed tion, ke mi devas preni la skribitan leteron, mi neniam povas rememori. Ĝi kuŝos sur la tablo, koleriĝos kaj turmentos min, kaj fine puŝos min ĝis vera malespero. Kaj nokte mi sonĝas, ke la letero jam estas sendita, kaj kiam mi vekiga mi atendas respondon. Sed hazarde mi proksimiĝas al la tablo kaj vidas ĝin — tiun damnindan leteron.

Jen kion signifas respondi al letero.

Ie, okcidente, matene oni malfacile povas pasi preter poŝkesto: granda vico da infanoj, gesinjoroj, servistinoj, oficistoj, etendas manojn kun leteroj, pakajoj, poŝtaj sendaĵoj.

Vespere ĉiu skribas kelkajn leterojn al siaj amikoj, parencoj, konatoj — linioj enhavantaj belajn sentojn aŭ aferpritraktojn.

Kaj ili skribas, sendas kaj ricevas respondon. Ili ne komprenos min!

Kaj mi pasos preter ili kun klinita rigardo, por ke ili ne tralegu en la fundo de miaj pupiloj mian sekreton, kaj ili ne eksci, ke tie sur la fundo de mia skribotablo kuŝas dekunu preskaŭ ne legitaj, kaj ne responditaj, leteroj.

Dekunul

Jes, ili estas dekunu.

Esperantiĝis: M.P.

Ĉiu Helpu al Informado pri Esperanto

Gravan lokon en la ĵus akceptita Baza Laborprogramo de UEA okupas la branĉo informado. UEA jam komencis realigadi diversajn laborojn, kiujn antaŭvidas la plano en tiu punkto (vidu la revuon *Esperanto* 1955, Junia numero, p. 187, p-to III/2). Estas reeldonata la bulteno de la Internacia Gazetara Servo en Esperanto kaj sendata al la landaj informaj fakoj kaj al multaj rektaj kunlaborantoj. Baldaŭ ĝi aperos ankaŭ en la angla lingvo kaj eble en la franca. Specialaj flugfolioj por informi pri Esperanto ĉefe la ĉeestantojn de neesperantistaj internaciaj kongresoj estas nun presataj en granda kvanto kaj estos je dispono de niaj landaj informaj fakoj. UEA klopodas larĝigi la reton de kunlaborantoj kaj ĝenerale plibonigi kaj pliampleksigi la tutan informadon.

Aliflanke ankaŭ la landaj asocioj, precipe la plej viglaj, intensigis sian informan laboron kaj aplikas al ĝi ĉiam pli bonajn metodojn. La societoj kaj grupoj, kiuj nun en multaj lokoj malfermas novajn kursojn, devas siavice fari precipe intensan propagandan laboron por altiri kiel eble plej multe da lernantoj.

Tiu tuta laboro de UEA, de niaj landaj asocioj kaj de la lokaj grupoj sendube donos siajn pozitivajn rezultojn. La sukceso, tamen, povas esti multe pli granda, se en tiu agado helpas ĉiu unuopa esperantisto. Tial per tiuj ĉi kelkaj linioj ni turnas nin rekte al ĉiu esperantisto individue.

Al la demando „Kiel mi povas helpi al disvastigo de Esperanto?“, kiun oni ofte aŭdas, ni donas jenajn konsilojn:—

(1) *Portu ĉiam la insignon.* — Estas facile konstati, ke preskaŭ duono de la aktivaj esperantistoj — por ne paroli pri la neaktivaj — neniam portas la Esperantan insignon. Kiam ĉiu esperantisto faros tiurilate sian devon, en la urboj de la mondo vidiĝos multe pli da verdaj steletoj, Memoru, ke portante la insignon oni ne nur konstante atentigas la neesperantistojn pri sia esperantisteco, sed ankaŭ povas esti plej simple rekonata de eksterlandaj vizitantoj en plej diversaj okazoj. Porti malgrandan insignon en la butontruo aŭ sur la robo, tamen ne identas al metado de multaj steloj sur sin! Tion ĉi nepre evitu.

(2) *„Esperanto parolata“.* — Ĉiuj, kiuj laboras en ŝtataj aŭ privataj oficejoj, entreprenoj, magazenoj, butikoj ktp., precipe en tiuj, kiuj multe rilatas kun la publiko, metu en konvenan lokon ŝildeton aŭ informon kun la indiko, ke tie Esperanto estas parolata. Kutime necesos konsento de la ĉefo. Ĉiu povas meti ien en sia propra oficejo aŭ entrepreno, aŭ sur la pordon de sia propra domo aŭ loĝejo tian ŝildeton.

(3) *Donu al via domo Esperantan nomon.* — En multaj landoj estas kutimo doni al sia domo ian nomon. Kial ne utiligi nian lingvon por tiu celo?

(4) *Revuoj en atendejoj.* — Se en la loko, kie vi laboras aŭ oficas estas atendejo, metu sur la tablon kelkajn bonajn esperantlingvajn revuojn. Atentu al la vorto *bona!*

(5) *Leteroj al gazetoj.* — En multaj landoj estas kutimo sendadi al la redaktoroj de gazetoj leterojn pri diversaj demandoj, publikigitaj en antaŭa numero. Kiam ajn vi rimarkas ian informon pri lingvaj malfacilaĵoj — kaj tiaj informoj vere abundas lastatempe — skribu malongan kaj ĝentilan, sed trafan leteron al la redaktoro kaj atentigu pri Esperanto. En tiaj leteroj neniam troigu, sed restu realeca.

(6) *Esperantaj libroj en bibliotekoj.* — Instigu la publikan bibliotekon, kiun vi kutime vizitas, havigi almenaŭ kelkajn Esperantajn

librojn. Postulu tiujn, kiuj respondas al via interesiĝo aŭ fako. Se iel eble instigu la bibliotekon aboni almenaŭ unu bonan Esperanto-revuon, aŭ mem havigu tian por ĝia legejo.

(7) *Parolu Esperante.* — Ne ekzistas pli bona kaj pli efika propagando por la Internacia Lingvo ol flua Esperanta interparolo. Por paroli flue oni devas praktiki. Por praktiki oni devas utiligi ĉiun okazon. Sekve, parolu Esperante ne nur en via societo, sed en ĉiu okazo, kiu prezentiĝas al vi.

Tio estas la minimumo, kiun povus kaj devus plenumi senescepte ĉiu esperantisto. La pli agemaj devus, krome, fari prelegeton pri Esperanto al siaj gekolegoj, gekamaradoj aŭ geamikoj (abunda materialo troviĝas en la verko *La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto*); instigi siajn gekonatojn lerni la lingvon aŭ en la kurso de la societo, aŭ kiel memlernantoj, aŭ alimaniere; mem instrui almenaŭ al unu persono Esperanton en la sekvanta laborjaro; varbi almenaŭ unu esperantiston kiel MA de UEA.

Ĉiu donu sian kontribuon. Ekagu jam hodiaŭ!

I.L.



La alta modo

La

dana

modo

Ordinare la danoj estas bone vestitaj. Kiam oni iras sur la stratoj oni renkontas multajn homojn kaj zorge ekzamenante la preterpasantojn oni rimarkas, ke malbone vestitajn homojn oni preskaŭ neniam vidas.

La plej multaj danoj respektas sin mem tiom ke estas por ili devo esti zorge kaj dece vestita. Komprenoble, se vi iras en la stratetoj aŭ proksimiĝas al fabrikaj kvartaloj, vi tie vidos homojn malpli bone vestitajn, sed tiam plej ofte temas pri laborvestaĵo kaj pri tia vestaĵo oni ne multe atentis.

En Danlando estas proverbo, kiu diras: „ne estas honto simili al sia laboro”. Post la labortempo la homoj ŝanĝas sian laborvestaĵon kaj reveninte de sia laboro la plej multaj portas vestaĵon bonkvalitan, puran kaj prudentan laŭ la jarsezono.

Precipe dum la lastaj jaroj aperis en la butikoj diversspecaj longaj pantalonoj por sinjorinoj kaj knabinoj. Vestaĵo, kiu celas eduki la sinjorinojn sin vesti pli varme kaj pli prudente en la aŭtuna kaj vintra sezonoj.

Silkaj ŝtrumpoj kaj vastaj jupoj

ne taŭgas por la dana vintra klimato kaj ĝuste en tiu kampo la percepto pri la modo grave ŝanĝiĝis. Antaŭ jardeko knabino kun respekto por si mem ne portis longajn pantalonojn — hodiaŭ la plej nova modo inter la junulinoj kaj lernejoj knabinoj estas longaj pantalonoj fabrikitaj el skotkvadrata ŝtofo.

La dana virina modo estas, same kiel la modo en multaj aliaj landoj, sub tre grava influo de Parizo, dum la porsinjora modo estas sub influo de Londono.

En la grandaj magazenoj, kaj en Kopenhago estas multaj tiaj, vi povas vidi la plej novajn ordonojn de la grandaj moddomoj en Parizo kaj Londono, kaj multaj el la magazenoj okazigos en la daŭro de la jaro demonstraciojn antaŭ la publiko por veki aŭ stimuli la intereson por bonkvalitaj kaj belaj vestaĵoj.

La vestmaniero en Danlando estas tre libera. Fakte oni ĉie povas porti, kion oni volas, ne estas severaj postuloj, kiujn oni devas sekvi. Nur en kelkaj ekskluzivaj restoracioj estas postulata festvestaĵo.

Estas la gejunuloj, kiuj gvidas en la kampo de la modo.

Kiam iu nova mod-ideo venas el eksterlando, kaj tiu ideo konformas al la gusto de la gejunuloj, tiuj ĝi kiel ŝtormo trakuras la tutan landon. Precipe en la grandaj urboj oni agnoskas la novajn modojn, sed tamen iom post iom ili enpenetras en la plej ekstremajn angulojn de nia lando.

En la malgranda Danlando ne ekzistas grandaj diferencoj en la vestmaniero. Homoj el la orienta parto kaj homoj el la okcidenta parto portas samspecan vestaĵon. Oni ne povas ilin lokigi laŭ la vestaĵo kaj tio fakte helpas doni al la vivo en Danlando demokratcan atmosferon. Promenante en la stratoj de Kopenhago oni ne povas diveni, ĉu direktoron aŭ ĉu lian oficiston oni renkontis. Jes, lando, kie eĉ la modo estas demokratigita.

K.

J. Ribillard

Vagado sub palmoj (7)

Beni-Abbes

Ćarma Etedeno

Sajnas kvazaŭ la Granda Sorĉisto iam estus tie preterpasinta kaj ŝtoniginta la monstrajn ondegojn, kiuj enabismigis Atlantison.

Ciklone blovpelataj de l'uragano la fluidaj montoj furioze interbatalis per sovaĝaj luktoj kaj torrente impetis al la nigra ĉielo en halucina deliro. Jen per magia frapo ili subite senmoviĝis kaj rigidiĝis en strangaj pozoj de kriplaj ciklopoj. Torturataj de kruelaj ventoj ili poreterne metamorfoziĝis en sablodunojn loĝatajn nur de malicaj koboldoj, kiuj devojigas la karavanojn, elsekigas la putojn kaj dum la senlunaj noktoj senripozigas la mistifitajn kamelistojn. Nun tie vastiĝas la „Erg”, dezerto el nebrila oro, lando de miraĝo kaj silento.

Ĉe la piedoj de la blondaj altaĵoj, en la senakva fluejo de la rivero Saŭra, kuŝas Beni-Abbes same kiel bela virino, cedeme sternita sur laŭmoda strando, oferas siajn pale bronzajn membrojn al la marmeza brizo. Alvenante de Colomb-Bechar post kvar cent kilometroj de tedega vojaĉo sur abomene nuda plataĵo, oni ekvidas la verdajn kapojn de la plumecejaj palmoj, kiuj ŝajnas elteriĝi kiel freŝkolora razeno. Kaj subite per apika trafendo de la klifo oni falas en la ombroplenan palmaron.

En mola kurbiĝo de la valo kaŭras la indiĝena vilaĝo, kies blankaj dometoj aglutiniĝas ĉe ambaŭ flankoj de mallarĝaj vojetoj. Jen staras la Transatlantik-Hotelo, en sudana stilo, kie nudpiedaj kelneroj tien kaj reen glitas sur dikaj lantapiŝoj. Ripozu momente sub la ogiva arkaro, ĉar mi speciale rekomendas, ke vi gustumu la fromaĝokukojn, kiujn fleĝma servisto ceremonie prezentos kun riĉaroma kafo turka. Ili estas la fiero de la kui-restro.

El arteza puto, tra la densa palmaro, fluegas sensala akvo, kiu irigaciras al la kulturitaj ĝardenoj kun kristaleca plaŭdado. Laŭlonge de la kanaletoj en kiuj kuras la klara sago de la oazo, ĝajemaj nigrulinoj lavas tolaĵon, ĥore klukante kaj ekridante pro siaj propraj petolaĵoj. Ĉirkaŭe de ili ravaj negridoj tute nudaj luktoludas, sin rulas sur la varma sablo, krias al la suno, kies sagetoj ekflamiĝas ilian brunan haŭton per oraj rebriloj. Ili aspektas kiel ebonaj fratetoj de Amoro skulptitaj de nigra Mikel-Anĝelo. Pacemaj mulatoj duonkantante prilaboras ĝardenojn, kie senorde kreskas la odora mento kaj la ebriiga kanabo, la barba

maizo kaj la griza fabo, la skarлата tomato kaj la dikventra akvomelono. Florplena oleandro sin fiere apartigas de modesta vinberujo, eleganta granatarbo moketas figarbon, misforman pro nukdoloro. Piedligitaj per telefondrato kelkaj malgrasaj kokinoj senlace serĉas netroveblan grenon. Brustopavante ĉielkoloraj turtoj kolombumas antaŭ grumblema ĝazelhundo. La verdanta insulo zone minacata de la despota dezerto, kiu ĝin malkompateme sufokas, aperas loga edeno al la sunrositaj vojaĝantoj.

Apud la aviadilejo, duone sablokovrita, staras kapeleto el premita argilo. La tegmento el palmo-branĉoj falruiniĝas kaj tralastas penetran orsablono, kiu dense tapiŝas la nudan teron. Nek meblo, nek seĝo. Nur ĉe unu el la palbrunaj muroj, mizera altaro el tabuloj malsperte fasonitaj kun skatoleto, kiu estis la sankta ŝranko... Meze de malvasta korto ĉirkaŭita de ŝanceliĝantaj muretoj, kruco farita el du trunketoj, per siaj stumpigitaj brakoj ŝajnas senespere alvoki fantomajn kreantojn, kiuj neniam venos. En sia morta forlaso tiuj emociaj ruboj atestas la foran tempon, kiam sanktulo celebris meson antaŭ du-tri piaz soldatoj, kaj vane provis prediki evangelion al la fieraj nomadoj adorantaj al la venkinta Dio. Ĉi tie estis la ermitejo de Patro de Foucauld, eksoficiro, sahara misiisto, amiko de la Hoggar-Tuareg¹⁾, kaj kiun fanatika senusiano²⁾ murdis ĉe la sojlo de lia kajuto en 1916. Kompatinda patro, respektata de ĉiuj, eĉ de la fervoraj mahometanoj, kiu, nenian idolanon konvertis, neniun disĉiplon varbis, sed ĉie postlasis en la koro la memoron pri la milda Galileano. Kaj antaŭ tiu nepra eldetruigo mi meditas pri la paroloj de la saĝulo: „Ne iru al via destino, ĉiam al vi trafas via destino”. Baldaŭ el la kapeleto tutkonsumita de la koleraj uraganoj de la sudo, restos nur amaseto de helora sablo, kiun disblovos la malpardonema vento...

Sur la vendokampo ĝardenistoj dismontras siajn frumaturaĵojn, kiujn gestemaj virinoj obstine marĉandadas, dum ĝajaj soldatoj amintrigas kun vualitaj knabinoj. Jen malrapide vagas aroĝantaj nomadoj. Sinjoroj de l'ardaj senlimejoj, la lastaj liberaj viroj. Iliaj malafablaj kaj blekaĉemaj dromedaroj kaŭras apud zizifarbo, kies spitaj dornoj malkuraĝigas ilian avidan ledolanganon. Iun taĝon mi vidis du el tiuj eternaj migrantoj venintaj el la

malproksima Tidikelt post kvardekkvintaga vojaĝo tra la timinda Okcidenta Erg. Pro bagatela malakordo pri heredaĵo el kelkaj daktilarboj ili senhezite decidis konfidi sian aferon al la militista tribunalo de Beni-Abbes, anstataŭ ĉikani ĉe la regiona tribunalo. La du kontraŭuloj obeeme akceptis la verdikton, kaj poste kune travesperis ĉe la berberaj dancistinoj, kies gazelokulojn kaj perlan rideton ili prirevos dum ili rehejmen rajdos. Por ili tempo neniom valoras: dekkvinminuta juĝa sido, unu plezurplena nokto kaj trimonata vojaĝo...

Meze de ronda ĉeestantaro stranga viro, seka kaj bruna kiel velkinta vinbertrunko, allogas la gapulojn per krudecaj krioj kaj manfrapata tamburino. Ŝnureto el nigra kamellano kronas lian zorge razitan kranion. Tamen fasketo da longaj haroj ornamas lian nudan verton. Tiun pendharajon ĉiu superstiĉa piulo religie konservas, ĉar ĝi utilas al Anĝelo Gabrielo por senprokraste suprentiri la jasmortintajn justulojn en la Paradizon de Allah — estu benita Lia sankta nomo. El lia eluzita burnuso eksteriĝas senkarnaj brakoj kaj kruroj, kiuj ŝajnas kvazaŭ partoj de ligna skeleto muntita supre de ĉerizarbo por timigi la glutemajn paserojn. Sub lia ĉifona vestaĉo deko da ledsakoj, kiuj sekrete entenas protektantajn talismanojn, traŝultre zonas lian malgrasan torson kaj lin aŭreolas de mistera potenco. Li estas maljuna fabelisto, kiu migradas tra la oazoj, prikantante antikvajn legendojn, la poeto de la dezerto, la bardo de la nomadoj. Per modulita sed akuta voĉo kaj multe da drastaj gestoj li deklamas, mimikas, eĉ vivas la batalojn kaj amoraĵojn de la mitologiaj herooj. Ekstravaganca pulĉinelo, li senbride agitiĝas, turniĝas, saltadas, naskante sub siaj piedoj nubeton el okra polvo kaj mienas kiel „Ŝitan”³⁾ ŝprucante el sia subtera imperio.

Li ne plu ludas — tragedie, komedie. Li vere estas la terura monstro, la kolera dio, la sangsoifa glavistaĉo, la ĉiopova diablo, la amavida reĝino, kaj ankaŭ ĉiuj bestoj, arboj, ventoj, la tuta aktoraro de la praaĝa folkloro.

Per impertinentaj, eĉ malprudaj vortoj, kiuj ridigas la virojn kaj ruĝigas la virinojn sub iliaj vualoj, la histriono komike elfinas sian dramatan patoson. Poste nigra kaj vigla knabo en kupran pelveton kolektas nombrajn monerojn, kiuj tintas en la zumado de la disiranta publiko. Ĉiu hejmen revenas dum la suno alpaŝas siajn lastajn sagojn al la puncaj dunoj, kies fronto ekflamiĝas per mil orbrilajetoj.

Rezulto de

Oktoobra konkurso

La Oktoobra konkurso sin bazis sur la radikvortoj de la ŝlosilo. Evidentiĝas ke la diverslandaj ŝlosiloj estas iom diferencaj. Ekz. la flandra, germana kaj norvega ŝlosiloj enhavas kelkajn radikojn

netroviĝantajn en la aliaj. Por ne favori la samideanojn en tiuj landoj ni simple forstrekis tiujn aldonitajn vortojn en iliaj solvoj, sed post tiu korekto konsideris ankaŭ tiujn solvojn validaj. La maksimuma nombro da radikvortoj, kiujn oni povas atingi el la literoj de la vorto „Esperanto”, estas 107 (event. plus la literoj a, e, n, o kaj u, kiuj troviĝas en

la ŝlosilo). Ne malpli ol 22 konkurstantoj havis tiun maksimuman nombron. Je lotumado inter ili elektiĝis la jenaj gajnintoj, al kiuj ni kore gratulas: 1-a premio s-ro Ben Sion Ohana, Marakech, 2-a premio S-ro Bas van der Wal, Rotterdam, 3-a premio S-ro Emile Borel, Arles-sur-Rhône.

La Konkursa Komitato.

Noktiĝas... Malva ombro stompas la konturojn. La pejzaĝo iĝas malneta kaj nevidebla. Ripozante sur la teraso de la militista posteno mi ĝuas la forglitadon de la silentaj horoj, kiuj sekrete agonias. Lampiroj suprenflugas en la senmova aero al siaj kuzinetoj el diamanto, kiuj gembrilas sur la stelsemita ĉielo. Fore, pro malsato kaj timo plorema ŝakalo bojaĉas. El la ŝprucanta minareto, kiu superas la ebenajn tegmentojn, unutona voĉo invitas la piulojn al la lasta preĝo de la tago. Mallaŭtiĝas la bruoj. Ie melankolia kamelisto elflutas malgajan arieton, kies malpreciza melodio ŝanceliĝas, rompiĝas kaj post abrupta sinkopo denove arpeĝas laŭ la sama rekantaĵo. Duone sternite sur ledaj kusenoj, kiuj ankoraŭ odoras la varmegajn paŝtejojn, mi revadas kun la okuloj al nekonata ĉielo, same pura kaj luma kiel dum la unuaj tempaĝoj de la mondo, kiam la dioj amis la homojn. Ĉirkaŭ la Norda Stelo, eterne turnadas la glaciaj konstelacioj, fantomaj ĉevaloj de burleska karuselo. Herakleso senespere postkuras la Virgon, la Leono kaj la Granda Ursino samvoje rapidas al la netraflebla Kaprino. La maldeca luno spionas la amorantojn, kiuj kate ŝtelumas tra la senbrua palmaro. Serena nokto, perfida nokto...

Mi intermite dormetas, kaj mi sonĝas, ke sendube estus al mi agrablege vivi ĉi tie, sencele, senambicie, sub tiu altiranta ĉielo, en ĉi tiu fatamorgana lando, kie la nedivenebla vizaĝo de Patrino Naturo min ĉarmegas kiel la enigmo rideto de Budao. Meze de tiu senviva, malplena dezerto, frunte al la timindaj dunoj, kiuj, filinoj de la Sfinkso, pereigas la malprudentulojn, mi grade forlasas mian formalan socion, kverelan kaj frivolan. Same kiel la lotusmanĝantoj mi bruligas miajn tiranajn idolojn, ne plu memorus pri mia pasinteco, kaj atingus la perfektan serenecon. Ĉu ennestiĝi inter la naivmora gento de tiu senluksa, sed senĉagrena oazo, ne preferinde, ol ĉasi al la vento tra nia okcidenta ĝangalo? Kaj sen pentoj, sen aspiro, eble mi trafus, en tiu kvietaj rifuĝejo, la animpacon laŭ Eklezisto: „Ĝuu la vivon kun amata virino dum la tuta via vana ekzisto, kiun Dio al vi donacis sub la suno, ĉar nek verkon, nek sciencan, nek saĝon vi trovos en la mortimperio, kien vi rapidas”.

Ĉarma etedeno, kie la saĝo floras en la ombro de la Transatlantika Hotelo, kies fromaĝkukoj, taŭge orbakitaj, simbolas la malestimindajn riĉaĵojn de la tero.

1) Tuareg: loĝantoj en Hoggar, centra lando de Saharo.

2) Senusiano: partiano de Senusio, fezzana agitisto.

3) Ŝitan: Satano.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 2-an de januaro 1956

N-ro 279

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de decembro kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de decembro 1954:

	<u>1954</u>	<u>1955</u>
Asociaj membroj	10723	14617
Individuaj membroj:		
MJ	1075	985
MA	3943	3995
MS	741	829
Pat.	7	9
DM	278	295
HM	59	58
	<u>6103</u>	<u>6171</u>
	<u>16826</u>	<u>20788</u>

DELEGITOJ:

Brazilo

Caratinga (Minas Gerais) VD: S-ro José Romão, fotografisto, Rua dos Viajantes 26.

FD: (Rotario): S-ro José Silvano Portes, horloĝisto, Av. Olegario Maciel 220.

Ceará (Fortaleza). FD (religio: katolika): F-ino Guiomar Aquino, ŝtatoficistino, Delegacia Fiscal Fortaleza-Ceará, Tel.: 1-5421.

Juiz de Fora (Minas Gerais). FD (juro): S-ro Benjamin Colucci, profesoro, Av. Rio Branco 3263 Tel. 1226.
FD (komercio): S-ro Orville Derby A. Dutra, komercisto, Rua Batista de Oliveira 512, Tel. 3467.

Danlando

Aalborg (Jylland). VD: S-ro August Nielsen, maŝinlaboristo, Engvej 18, Mølholm.

Franujo

Metz (Moselle). D: vakas.

Germanujo

Aachen (Nordrhein Westfalen). FD (turismo): S-ro Edgar Perseke, eksinstruisto, Turpinstr. 104.

Neumünster (Schleswig-Holstein). D: S-ro Heinrich Brunstamp, bankdirektoro, Färberstr. 79. Tel.: 3985.

Stolberg (Rheinland). D: S-ro Hans Siffirin, muzikinstruisto, Eschweilerstr. 50. Tel.: 2620.

Weseke (Westfalen). D: vakas.

Wiedenbrück (Westfalen). FD (vin-komercio): la D.

Italujo

Trieste: D: S-ro Lino Vitali, komercisto, Viale Miramar 13.

Jugoslavio

Beograd. FD (muziko): vakas.

Grabrovnica (Hrvatska). FD (mond-federalismo): vakas.

Kranj. D: vakas.

Varazdin (Kroatio). FD (komercio): vakas.

Zagreb. FD (arkitekturo): vakas.

Portugalujo

Lisboa. D: S-ro José Bigotte de Almeida, licea profesoro, Rua Actor vale 16, 1.E.

Svedujo

Malmö. FD (Filatelo): vakas.

Ystad (Skåne). FD (elektro-komercio): S-ino Gun Andersen, kontoristino, Kyrkogårdsgatan 17 B. Tel.: 12551.

MEMBRO-SUBTENANTO 1955:

824 Aquino, F-ino Guiomar, Cearã, Fortaleza, Brazilo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1956:

42. Elderkin, s-ro T., Reading, Britujo.
43. Fraser, s-ro T. C., Kirkcaldy, Britujo.
44. French, s-ro R. J., Bexley, Britujo.
45. Fuller, s-ro S. T., Brighton, Britujo.
46. Gardner, s-ro C. W., Sheffield, Britujo.
47. Goulding, s-ro E. I., Woking, Britujo.
48. Gueritte, s-ro T. J., Surbiton, Britujo.
49. Jones, s-ro D. R. T., Lampeter, Britujo.

50. Pearson, f-ino E. M., York, Britujo.
51. Pilling, f-ino, F., Burnley, Britujo.
52. Pilling, s-ro Harold, Burnley, Britujo.
53. Sarfas, s-ro E. W., New Barnet, Britujo.
54. Saunders, s-ino A. J., Ventnor, Britujo.
55. Hansen, s-ro E., København, Danlando.
56. Hansen, s-ro Holger, Holbaek, Danlando.
57. Jensen, s-ro H. E., Toustrup, Danlando.
58. Larsen, s-ro L., Odense, Danlando.
59. Møller, s-ro P., Viborg, Danlando.
60. Ohrberg, s-ro P. M., Nykøbing, Danlando.
61. Trier, s-ro Bent Sejr, Haslev, Danlando.
62. Helfers, s-ro F., Karlsruhe, Germanujo.
63. Jolliet, s-ro Leo, München, Germanujo.
64. Pilhofer, s-ro Otto, Nürnberg, Germanujo.
65. Raab, s-ro Johann, Nürnberg, Germanujo.
66. Schönrich, s-ro K., Wiesbaden, Germanujo.
67. László, prof. Tóth, Gomba, Hungarujo.
68. Jager, f-ino A. J. M. de, Bandung, Indonezio.
69. Blöndal, s-ro Björn, Hvammstanga, Islando.
70. Costantini, s-ro L., Milano, Italujo.
71. Perini, s-ro Gustavo, Belluno, Italujo.
72. Borčić, f-ino Lucija, Zagreb, Jugoslavujo.
73. Petrović, s-ro Svetislav S., Sjenica, Jugoslavujo.
74. Salberg, s-ro Erik E., Selce, Jugoslavujo.
75. Roberts, s-ro Christie W., Rose Valley, Kanado.
76. Tuch, s-ino R. M., Toronto, Kanado.
77. Benjamins, f-ino Ch. Ch., Amstelveen, Nederlando.
78. Zorgdrager, f-ino Cornelia, Amerongen, Nederlando.
79. Almén, s-ro Helmer, Stockholm, Svedujo.
80. Assarsson, f-ino Asta, Hälsingborg, Svedujo.
81. Blid, s-ro A., Nynäshamn, Svedujo.
82. Cooper, s-ro B., Boras, Svedujo.
83. Emson, s-ino Regina, Boras, Svedujo.
84. Frode, s-ro O., Göteborg, Svedujo.
85. Hakansson, s-ro Hugo, Traryd, Svedujo.
86. Jense, s-ino Märta, Jöngköping, Svedujo.
87. Mellberg, f-ino G., Varberg, Svedujo.
88. Moberg, s-ro Karl J., Bromma, Svedujo.

89. Nolberg, s-ro Emil, Surte, Svedujo.
90. Olsson, f-ino G., Strömnäsbruk, Svedujo.
91. Persson, s-ro Gösta, Hälsingborg, Svedujo.
92. Schöllin, s-ro Oscar, Dyltabruk, Svedujo.
93. Sjöberg, s-ro Helge, Gnosjö, Svedujo.
94. Stenström, s-ro John, Jöngköping, Svedujo.
95. Svärd, s-ino Rut, Boras, Svedujo.
96. Turner, s-ro Fred, Linköping, Svedujo.
97. Barta, s-ro R., Denver, Usono.
98. Baur, d-ro A., Liebfeld, Svislando.
99. Bohren, s-ro prof. A., Thun, Svislando.
100. Brun, s-ro P. le, Kreuzlingen, Svislando.
101. Harry, s-ro Ralph, Genève, Svislando.
102. Hattemer, s-ro H., Solothurn, Svislando.
103. Hohl, s-ro Jacob, Flims-Waldhaus, Svislando.
104. Kuhn, s-ro G., Zürich, Svislando.
105. Roth, f-ino Frieda, Solothurn, Svislando.
106. Brink, s-ro Dirk M., San Diego, Usono.
107. Bush, s-ro Jarvis E., Milwaukee, Usono.
108. Falgier, s-ro George, St. Louis, Usono.
109. Iggers, d-ro Georg G., Little Rock, Usono.
110. Sinnick, s-ro Stephen A., Power, Usono.
111. Svarstad, s-ro Iver, Los Angeles, Usono.

112. Turner, s-ro Glenn P., Middleton, Usono.
113. Woodruff, s-ro E. W., Johannesburg, Sudafriko.

DONACIOJ AL LA GENERALA KASO:

A. Wesser, Usono £ -4.6.

ELEKTO DE KOMITATANOJ B

Speciala atentigo al ĉefdelegitoj kaj delegitoj

En tiu ĉi jaro okazos la elektoj de la komitatanoj A, B kaj C. Ilia mandato komenciĝos la unuan tagon de la Universala Kongreso en Kopenhago.

Laŭ la statuto (par. 25/a) kaj la ĝenerala regularo (par. 28) je 250 ĉefdelegitoj kaj delegitoj laŭ la stato de la 31-a de decembro 1955, estas elektata po unu komitatano B. Sekve en tiu ĉi jaro la ĉefdelegitoj kaj delegitoj rajtas elekti 5 komitatanojn B.

Laŭ la par. 28/b de la ĝenerala regularo, la ĉefdelegitoj kaj delegitoj estas invititaj fari proponojn pri la kandidatoj. Kvin ĉefdelegitoj kaj delegitoj (ne la vic-delegitoj aŭ la fak-delegitoj) rajtas proponi unu kandidaton el inter la individuaj membroj de la Asocio. La kandidato devas skribe konsenti al sia kandidatiĝo. La proponoj pri la kandidatoj kun ilia skriba konsento devas atingi la Administran Oficejon de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C, Nederlando, plej malfrue la 31-an de Marto 1956. Proponoj, kiuj ne estos subskribitaj de 5 ĉefdelegitoj aŭ delegitoj, aŭ kiuj ne enhavos la skriban konsenton de la kandidato, aŭ kiuj atingos la Administran Oficejon post la menciita dato, ne povos esti prenita en konsidero.

GRAVA ATENTIGO

Ni ripetas nian informon al la membroj en landoj de la Brita Komuno, ke la translokiĝo al Nederlando kaŭzas al ili nenian financajn problemojn, ĉar ili povos sendadi kiel ĝis nun britajn poŝtmandatojn ankaŭ al nia nova oficejo.

Kun miro ni devis konstati, ke multaj membroj el la anglalingvaj teritorioj kutimas korespondi kun UEA en angla lingvo. Kvankam niaj oficistoj regas tiun lingvon kaj regule uzas ĝin en korespondado kun neesperantistaj instancoj kaj personoj, ni urĝe apelacias al la esperantistoj uzi la internacian lingvon en nia internacia organizaĵo, por ke neniu dubu pri nia estimo kaj fido je propra afero.

JANUARA NUMERO

La januara numeron de la revuo Esperanto ni presigis en pli granda kvanto ol kutime kaj dissendis i.a. al ĉiuj MJ kaj al aliaj interesitoj, kiujn ĝi eble konvinkos pri la bezono aboni ĝin.

Krome, ni sendis ekstrajn kvantojn al multaj fidelaj kunlaborantoj kaj ni esperas, ke ili efike uzos ilin en sia varbado.

DANKESPRIMO

Dum la decembra festotaga sezono atingis nin amaso da gratuloj kaj bondeziroj el ĉiuj anguloj de la mondo. Estas maleble respondi al ĉiuj individue, do oni permesu ke ni ĉi tie esprimu nian dankon por ĉies koraj kaj afablaj vortoj. Plej varme ni reciprokas ĉiujn bondezirojn pri prospera Nova Jaro kaj aldonas la esperon pri agrabla kunlaborado kun niaj regulaj korespondantoj, malgraŭ sendube okazantaj malglataĵoj en la komenco, neeviteblaj post tiaj gravaj ŝanĝoj, kiaj okazis en la lastaj monatoj.

M. H. Vermaas,
Administranto

ANONCETOJ

„Vere, ĉiu homo nepre konstruas Dion laŭ sia bildo, kaj ĉiuj kvalitoj iam ajn atribuitaj al la Kreinto estis origine homaj.” — Broom.

30 gekursanoj deziras korespondi kaj intersanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun la tuta mondo. Skribu al: Wojowódzki Dom Kultury, Atalinogród (Pollando), str. Francuska 12, Esperanto-Rondo.

Deziras korespondi kun tutmondaĵ esperantistoj Antonio Leonardo Sobrinho, Saõ Clemente 345, Rio de Janeiro, Brazilo.

Deziras intersanĝi reklamrajonojn, alumetskatolojn ĉiulande Plinio Monteiro Gastro, S. Francisco Xavier, 420, Rio de Janeiro, Brazilo.

30-jara profesoro deziras korespondi kaj intersanĝi bildkartojn tutmonde. Respondejoj garantiitaj. Stanojeviĉ Brana, profesoro, gimnazio en Mostar, Jugoslavio.

Akvaristoj, Natursciencaj film-kaj fotoamatoroj serĉas kontakton en la tuta

mondo kun similaj esplorantoj. Temoj: papilioj, skaraboj, kolektado, naturo-pejzaĝo-fotografado, mikrofilmo kaj -foto. International Club for Amateur-Photo, Film Exchanges, I.C.A.F.E., Hungario, Budapest, XI. Puskás tér 13. Org.: Árpád G. Pölöskey.

Deziras intersanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj Alfred Mayer, Weinbrennerstr. 59, (17a) Karlsruhe, Germanujo.

Korespondanta Servo Mondskala havigas korespondantojn el multaj landoj. Petu ilin, indikante vian aĝon kaj aldonante respondkuponon, de Daniel Luez, Boulevard Brossolette, Laon, (Aisne), Francujo.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14s. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltigis laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. A. Bytheway, „Flat Four”, 1 Warrington Crescent, London W.9, Anglujo. Telefono CUINningham 4487.

Kursanoj aranĝos 25-4 1956 letervesperon. Korespondemuloj skribu al Jan Blazek, Stalinova 198, Strakovice, Ĉeĥoslovakio.

Fino Eevi Koljonen, Kauraketo, Somero, Finnlando, (17-jara), deziras korespondi per L kaj PI kun gejunuloj el ĉiuj landoj.

Juna turka instruistino Fevzije Halilova Kasimova, Sveŝtari, Ispiriksko, Bulgario, sincere deziras korespondi speciale kun geinstruistoj el Francujo, Britujo, Belgujo, Portugalujo, Sovet-Unio, Hispanujo, Egiptujo, Alĝerio, Ameriko, Hindujo kaj Svislando, pri historio, ekonomio, sociologio kaj literaturo. Certe respondos.

Studenta scienca rondo deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Adreso: Bulgarujo, Sviŝtov, Supera Financa Ekonomia Instituto, Studenta Rondo.

Grupo esperantistoj-havenaj oficistoj kaj laboristoj deziras kolektive kaj individue korespondi kun kolegoj en la tuta mondo. Adreso: Petar Petrov Petrov, dispeĉer, Pristaniŝte Ruse, Bulgarujo.

D-ro V. Soukup, Odolena Voda apud Praha, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi pri lepidopterologio (scienco pri papilioj) kaj intersanĝi artikolojn, ekzemplerojn de papilioj, fakajn gazetojn ktp. Lingvoj: Esperanto, franca, germana, latina.

La Biblioteko de UEA

deziras akiri, pagante aŭ ŝanĝante kontraŭ alia verko

Frazeologio, rusa-pola-franca-germana
kompilita de M. Zamenhof 1905.

kaj

Proverbs Esperanto-English, translated by
Montagu C. Butler

Ofertojn al Universala Esperanto-Asocio
Palais Wilson, Genève

LASTMOMENTE

Dum la presigo de la gazeto atingis nian redakcion jenaj du gravegaj informoj:

La Kulturkomisiono de la Eŭropa Konsilantaro unuanime aprobis la rezolucion pri Esperanto

La Komisiono por Kulturaj kaj Sciencaj Demandoj de la Eŭropa Konsilantaro, kunveninta la 25-an de Januaro en Parizo, unuanime aprobis la proponon entenitan en la Rezolucio de la 14 Repraŭzentantoj en la Eŭropa Konsilantaro, laŭ kiu oni rekomendas al la Komitato de Ministroj la eksperimentan instruadon de Esperanto en kvin lernejoj de Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando.

Sovetunio ekuzis oficiale Esperanton

„Sunday Times”, unu el la plej gravaj britaj dimanĉaj gazetoj, komunikis en sia numero de la 22-a de Januaro, la sensacian novaĵon, ke V. Molotov respondis per telegramo en Esperanto kaj en la Angla al „Japana Popola Konsilantaro”. Tiu informo estas konfirmita en telegramo de Tokio al Londono. La novaĵo vekis grandan interesigon en ĉiuj medioj, precipe en tiuj de parlamentanoj kaj diplomatoj, ĉar estas la unua fojo, ke Esperanto estis uzita kiel diplomatia lingvo.

Detaloj kaj komentoj pri ambaŭ novaĵoj en la sekvanta numero de nia revuo.

Estas aĉeteblaj binditaj volumoj de

ESPERANTO 1955

En verda tolo, kun indekso
Mendu tuj, la kvanto estas limigita!

RIĈA GRAVEGA KOLEKTO:

La kompleta dokumentaro pri la okazintaĵoj en Montevideo:

Ĉiuj raportoj pri la Jubilea Kongreso en Bologna;

Premiitaj Belartaj Konkursajoj;

Perloj el nia literaturo en neniu alia loko publikigitaj;

Renkontoj kun Kalocsay, Baghy, Schwartz, Forge, Waringhien;

Multaj artikoloj pri diversaj kulturaj temoj.

Por MA 1955 de UEA: 3 n.gld. (12 steloj) afrankite;
por aliaj: 6 n.gld. (24 steloj) afrankite.

KOMPLETIGU VIAN SERION!

Estas ankoraŭ malgranda provizo de binditaj jarkolektoj

1954, 1953, 1952, 1951

Gravaj dokumentoj pri la historio de la movado;

Sciindaĵoj pri la esperantista agado sur ĉiaj kampoj;

Fontoj de literaturaj belajoj.

Prezo por 1954 kaj 1953 kiel por 1955

Reduktita prezo por 1952 kaj 1951:

Por MA de la koncerna jaro: 1.50 gld. (6 steloj);
por aliaj: 3.— gld. (13 steloj).

Mendu ĉe:

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C. Nederlando

la nica

literatura

REVUO

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformata
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj lan-
daj Perantoj de UEA

Redakcio: Administracio:
7. Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

La traduko apartenas al la grandaj ŝarĝoj de nia literaturo.

F. Szilagyi

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo: bind. 15 ŝil., broŝ. 12s, 6p., afranko 9p.

Eldonis: ELDONA RONDO,

Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe.

U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.

LA REVUO ESPERANTO EN NOVA VESTO

Kun nova redaktoro, de nova presisto, el nova oficejo.
Pli bela, pli alloga, pli dezirinda ol iam antaŭe.

Certigu al vi la regulan ricevadon!
MA! Tuj pagu vian kotizon 1956
(10 gld.; 40 steloj);

Abonantoj! Renovigu vian abonon
(7.50 gl.; 30 steloj);

Mj! Se eble, kresku al MA en tiu ĉi jaro.....

Pagu al Landaj Asocioj, Ĉefdelegitoj, Perantoj en propra valuto aŭ rekte al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7 en guldenoj aŭ steloj.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam